

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto



සමස්තමාන
ප්‍රකාශනපාලනය

Ĉi-numere legu pri:

**MALFONDITA LA ESPERANTO-SOCIETO
"BUDE BORJAN" EN ZAGREBO**

ASPEKTOJ DE BALKANIO

KATASTROFO DE JAPANIO

**APERIS "LA KAPREOLIDO PIRGO"
EN ESPERANTO**

EN AMIKA LITOVIO

1

2011

Sur la foto: Anto Mlinar, prezidanto de "Bude Borjan",
legas la proponon pri malfondo de la societo

Zagreba Esperantisto

Numero 1 (14)

Jaro V

majo 2011

www.zagreba-esperantisto.hr

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Snježana Habulin, Vida Jerman,
Jozo Marević, Radenko
Milošević, Velimir Piškorec,
Josip Pleadin, Mato Špekuljak

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Neregula

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

RESUMO

Rapidas la vivo kaj ni provas kapti ĝian ritmon. Ankaŭ la Esperanto-movado travivas transformiĝojn, kiujn ni, la uzantoj de la Internacia Lingvo, kelkfoje nesufiĉe konscias. En la enlanda movado estas almenaŭ du eventoj kiuj markos la movadan historion: la okazigo de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, pri kiu pli detale ni skribos en la sekva numero de nia gazeto, kaj la malfondo de la plej granda, la 66-jara Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo, kies Asembleo akceptis la decidon pri malfondo en sia jarkunveno la 20-an de aprilo. Por multaj ĝi estas grandega surprizo, sed onidiroj pri tia neceso cirkulis jam de kelkaj jaroj.

El internaciaj temoj ni tuŝas la katastrofajn tertremojn kaj cunamon en Japanio, kiuj trafis la landon per nekredbla forto. Japanio apartenas al la plej stabilaj partoj de Esperantujo, kaj ni esperu ke la katastrofo ne kaŭzos malfortiĝon de la tiea Movado.

Nia kolego Vlado Jurković vojaĝis tra Litovio, kaj liajn impresojn pri tiu amika lando ni publikigas en ĉi tiu numero. Alispeca estas la vojaĝraporto de Uwe Joachim Moritz, la gvidanto de IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) kaj lia edzino, kiuj travojaĝis la regionon de Balkanio.

Nia tempo, karakterizata per monda ekonomia krizo, estas maloportuna por grandaj Esperantaj projektoj, sed niaj samideanoj ne volas pesimisme rigardi la aktualan staton. En la ekonomie malfacilaj periodoj estas neracie entrepreni gravajn projektojn, sed niaj movadanoj daŭre montriĝas sufiĉe elastaj por kontraŭstari la malfacilaĵojn. Ĉi-jare tio aparte montriĝas per nekutime ampleksa eldona agado. En la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar estis prezentitaj eĉ tri novaj libroj. La plej ampleksa estas la kroatlingva eldono de "La sklavo de dio" de la hungara verkisto Géza Gárdonyi, kiun pere de Esperanto tradukis Aleksandar Kocian el Osijek. Li ankaŭ komplete financis la 400-paĝan eldonon. La dua libro estas la fama porinfana romaneto de la kroata verkistino Anđelka Martić "La kapreolido Pirgo", tradukita de Josipa Katunar el Rijeka kaj eldonita de "Grafokom" el Đurđevac. Al la eldona aktiveco kontribuis ankaŭ la eldonejo "Izvori" de Damir Mikuličić, kiu aperigis la Esperantan eldonon de la bengala verko "La vivo de Damoru", famiĝinta en la EU-projekto de Kroata Esperanto-Ligo.

Pro la amaso da preparoj por diversaj aranĝoj en Kroatio ni konkludas, ke la ĉesojla somero estos riĉeventa. Detale ni raportos en niaj estontaj numeroj.

La redakcio

LA HISTORIA PRECEDENCO

Malfondita la zagreba Esperanto-societo “Bude Borjan”

✍ *Josip Pleadin*

La 20-an de aprilo je la 19h00, en la sidejo de Kroata Esperanto-Ligo en Zagrebo, Kneza Mislava 11/III, okazis la lasta jarkunveno de la plej granda kaj la plej malnova Esperanto-societo en Kroatio post la dua mondmilito. En la 66-a jaro de sia ekzistado, la societo estas malfondita.

Tiu ĉi evento estas iasence precedenco en la historio de la kroata Esperanto-movado. Kutime societoj malaperis pro neaktiveco, sed por la unua fojo okazas konscia malfondo, kaj eĉ de la plej granda kaj la plej forta societo. Tiu evento estas certe grandega surprizo por multaj esperantistoj de Kroatio, sed ankaŭ en eksterlandaj Esperanto-rondoj ĝi provokos mirajn demandojn.

En la jarkunveno kolektiĝis 35 membroj de la societo, kio sufiĉis por havi la necesan kvorumon (25). La jarkunveno komenciĝis per malpli doloraj temoj: saluto de la prezidanto Anto Mlinar kaj la raportoj de la sekretario Spomenka Štimec kaj la kasisto Boris Ĉović. La plurpaĝa sekretaria raportoj pri la jaro 2010 (65-a jaro de funkciado) notas amason da aktivecoj, sed la kasista raportoj konsciigas, ke la financoj de la societo estis tre magraj, kaj ke la plejparto el la aktivecoj realiĝis nur dank' al malavara helpo de unuopuloj (jen en formo de laboro, jen en formo de kostokovro).

En la jaro 2009 la societo havis 97 membrojn, en la jaro 2010 - 87, kaj en la jaro 2011, konkludante laŭ la necesa kvorumo (25 membroj), ĝi havis nur 50 membrojn. Malkresko de la membraro estas kaŭzita grandparte per aĝo-strukturo, respektive per forpaso, sed ankaŭ per ekonomiaj kaŭzoj.

La ĉeestintaj membroj akceptis la raportojn ĉiuvoĉe, post kio la societa prezidanto Anto Mlinar havis la malagrablan taskon informi ilin pri la decido de la societa estraro:

"La estraro de la Esperanto-societo *Bude Borjan*, en sia kunsido okazinta la 6-an de aprilo 2011, kun la komenco je la 20h00, en kies tagordo troviĝis la preparoj por la societa jarkunveno, diskutinte pri la facilajloj en la funkciado de la societo, preparis la jenan proponon pri malfondo de la societo:

Oni proponas al la Asembleo de la Esperanto-societo *Bude Borjan* en sia jarkunveno akcepti la proponon pri malfondo de la societo.

Klarigo:

1. La Esperanto-societo *Bude Borjan* estis fondita somere de 1945 kun la sidejo en Primorska strato en Zagrebo, kaj jam dum la jaro 1947 ĝi ricevis por uzado la ejon en la loĝejo sur la unua etaĝo en la

strato Amruševa 5 en Zagrebo, en kiu ĝi funkciis ĝis la jaro 2003, sed devis elloĝiĝi surbaze de tribunala verdikto kaj transdoni la ejon kun 80 kvadrataj metroj al privata persono. Tiamaniere restinte sen tre adekvata ejo por sia agado, ĝi devis traslokiĝi kiel "subluanto" al Kneza Mislava 11 sur la trian etaĝon sen lifto, kio por la membraro, laŭ la aĝostrukturo tre maljuna, havis escepte negativan efikon.

2. Subvencioj de la loka administrejo, respektive de la urbo, jaron post jaro malgrandiĝis, kaj dum la lastaj jaroj komplete ĉesis alflui, kaj la societo disponas nur pri la enspezo de membrokintoj kaj bonvolaj monkontribuoj de la membraro, kio montriĝis nesufiĉa por kovri eĉ la plej necesajn elspezojn, kio videblas el la financaj raportoj.

Sekve, en tia situacio ankaŭ la membraro ĉiam pli pasiviĝas, perdas la volon kaj intereson por laboro, pro kio la estraro ne povas plenumi la laŭstatutajn taskojn kaj proponas al la asembleo akcepti la decidon pri malfondo de la societo, konforme al la preskriboj de la Leĝo pri asocioj kaj sia Statuto."

Post la oficiala informo pri la estrara decido, disvolviĝis la diskuto, en kiu detalajn klarigojn donis Spomenka Štimec, post kio la asembleo akceptis la proponon de sia estraro. La societa prezidanto Anto Mlinar, per ĉiuj voĉoj de la ĉeestintaj asembleanoj estis elektita likvidanto de la societo.

La perdo de la plej granda societo, kiu en la landa movado havis neimageble grandan kaj valoran rolon kaj reputacion, doloros la multajn membrojn, sed pleje verŝajne la doloron sentos ĝiaj lastaj vivantaj kunfondintoj, la veteranoj kaj honoraj membroj de UEA, Lucija Borčić kaj Ivo Borovečki, kiuj kun bedaŭro sed ankaŭ kun plena komprenemo akceptis tiun informon. La sortobaton sentos ankaŭ s-ino Milena Borjan, la nevino de la heroo Bude Borjan, kies nomon portis la societo.

Post la proklamita decido pri malfondo, la societa sekretario Spomenka Štimec invitis la BB-anojn aktiviĝi en Kroata Esperanto-Ligo kiel individuaj membro, aŭ membriĝante al aliaj urbaj societoj, unuavice al Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) aŭ Kroata Fervoja Esperanta Asocio (KFĖA). La jarkunvenon alparolis ankaŭ Radenko Milošević, la prezidanto de UZE, kiu distribuis la aliĝilojn de UZE, kaj kelkaj personoj tuj subskribis ilin. La aliĝon de BB-anoj al UZE subtenis ankaŭ Neven Kovačić, kiu pretas disponigi sian grandan loĝejon en la urbocentra strato Martičeva 13/6 por regulaj programoj de UZE.

Al ĉiuj geesperantistoj ne nur el Zagrebo!

KIALOJ POR ALIĜO KAJ PLUA AKTIVADO

 Radenko Milošević

Priplorinda afero pri la malfondo de la plej malnova kroata Esperanto-societo "Bude Borjan", kiu estis la unua fondita post la Dua mondmilito, estas jam konata, nemodeste dirite – en la mond vasta Esperantujo. Ni ne haltu kaj ne restu sen Esperanto-estonteco! Jes, sed ... Kiel?

Ekzistas ideo, ke la membraro de la malfondita Esperanto-societo "Bude Borjan" aliĝu al Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj. Tiu ideo ekaperis jam dum la bedaŭrinda plenvoĉa akcepto de la malfondo de nia elstara fonto de Esperanto-aktivecoj en Zagrebo, en eksa Jugoslavio, kaj en la mondo. Ĉi-momente oni vere ne havas pli bonan solvon. Por ke la membraro ne malaperu senrevene, ĝi estu organizita en iu jam ekzistanta societo. Ĉar Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) ekzistas kaj aktivas, ni proponas ke la membraro aliĝu al la nunaj 22 individuaj kaj kolektivaj membroj de UZE.


Ni rememorigu vin, ke Zagreba Esperantista Societo estis fondita en la jaro 1919 kaj refondita la 4-an de novembro 1981 sub la nomo de Zagreba Esperanto-Ligo (ZEL). Ĝi komencis publike funkcii fine de 1986. Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj transprenis la standardon kun la verda stelo de tiuj du E-organizaĵoj, kaj marŝas antaŭen! UZE estis (re-re)fondita la 12-an de decembro 2007, kiel postsekvo de la propono de dekunu esperantistoj, okazinta dum la kunsido de la estraro de Kroata Esperanto-Ligo la 12-an de majo 2007.

La Unuiĝo eldonas kaj dissendas la gazeton "Zagreba esperantisto" ne nur al sia membraro, sed ankaŭ al eksterlandaj legantoj. Bedaŭrinde, pro la ekonomia krizo (sentebla ankaŭ ĉe ni!), dum la pasintaj du jaroj aperis nur tri numeroj, sed ĉi-jare ni rekomencos tion al niaj legantoj. Nian retejon: www.zagreba-esperantisto.hr trafis pli ol unu milono da vizitintoj. Pro la antaŭvidita malfonado de nia Esperanto-bravulo, jes ni ne havis jarkunvenon, sed post la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, ni planas ankaŭ ĝin okazigi. Ni esperas, ke ni trovos iun personon kiu transprenos la multjaran taskon de nia diligenta kaj preskaŭ neanstataŭigebla sekretario de "Bude Borjan" (kaj KEL) s-ino Spomenka Štimec.


En la pasinto ZEL sukcese efektivigis kelkajn projektojn, ekzemple: (i) la eldonadon de la monata bulteno "Zelano", kiu aperadis ĝis la militjaro 1992, (ii) la starigon de memortabulo okaze de okdekjariĝo de la unua numero de la gazeto "Kroata Esperantisto" sur la domo en la Placo de reĝo Tomislav 21, kie estis la unua redakcejo (la tabulon malkovris s-ino Emilija Lapenna), (iii) fondon kaj atribudadon de literatura premio "Ivo Rotkvić", (iv) eldonadon de negrandaj, A6-formataj libretojn en la t.n. "Etlibra serio", ktp.

Ĉi tiujn rezultojn de la komuna streĉo de tiamaj zagrebaj kaj kroataj esperantistoj kaj kunlaborantoj el ĉiuj ĝemelaj urboj de Zagrebo, ni devus daŭrigi kaj plibonigi.


Do, aliĝu al UZE kaj ni kune portu la torĉon!



Andrija Mohorovičić



Josip Ruder Bošković



Marko Antun de Dominis



UNESCO KAJ KROATAJ SCIENCISTOJ

Executive Board 181 EX/45 Item 45 of the provisional agenda
 PROPOSALS BY MEMBER STATES CONCERNING THE
 CELEBRATION OF ANNIVERSARIES IN 2010-2011 WITH

4. Recommends to the General Conference:

(a) that UNESCO should be associated in 2010-2011 with the following celebrations:

CROATIA

(7) 100th anniversary of the discovery of the Mohorovičić Discontinuity by **Andrija Mohorovičić (1910) (Croatia)**

(8) 300th anniversary of the birth of **Ruder Josip Bošković, physicist, astronomer, mathematician (1711-1787) (Croatia)**

(9) 450th anniversary of the birth of **Marko Antun de Dominis, philosopher and scientist (1560-1624) (Croatia)**

Jen la teksto kiu estas ĉerpita el interreto kiel ĝenerala propono de UNESCO por ĉi-jaraj jubileaj celebroj rilatantaj al nia hejmlando Kroatio. Estis akceptita la propono de la kroatia Ministerio pri kulturo, ke UNESKO aldonu ankaŭ nian triopon inter la mondfamajn sciencistojn, kies jubileojn oni celebros en 2011. Al tiu iniciato certe devus aliĝi ankaŭ kroatiaj esperantistoj per verkado de artikoloj, okazigo de prelegoj aŭ alimaniere! Almenaŭ ni artikolu pri tiuj tri gravaj homoj, kies kontribuo, kune kun multaj aliaj kroataj sciencistoj, estas enkonstruita en la mondan scienco-turon. Nur per kelkaj vortoj ni tuŝu tiujn grandsciencistojn el Kroatio, kies laboro estas mondscale agnoskita.

Komence de la 20-a jarcento **Andrija Mohorovičić** okupiĝis pri la problemoj de sismologio. Post la tertremo en Pokupsko, komunumo apud Zagrebo, la 8-an de oktobro 1909, Mohorovičić analizis la fenomenon de la mekanismo de disvastiĝo de tertremaj ondoj. La unua en la mondo, li konstatis, ke la tero ne estas homogena, ke en ĝia interno ekzistas tavolo, kiu rezultigas diskontinuecon kaj diferencon en rapideco de tertremo-ondoj. Tiu ĉi tavolo disigas la terkruston de la tervolvajo, nomita je lia honoro - Diskontinueco de Mohorovičić (mallonge: MOHO-diskontinueco). Ni menciui, ke Kroatio poŝto eldonis poŝtmarkon dediĉitan al la 150-jara jubileo post lia naskiĝo, pri kiu ni raportis en "Zagreba esperantisto", n-ro 3/2007.

Unu el la plej elstaraj homoj de la monda scienco estas sendube **Josip Ruder Bošković**. Nobelpremiito Werner von Heisenberg diris, partopreninta la simpozion pri Bošković en Dubrovnik en la jaro 1998, "ke liaj tezoj en Teorio de filozofio natura estas komprenitaj apenaŭ en la lastaj kvindek jaroj de la 20-a jarcento per la moderna fiziko". Krom tio li diris, ke Bošković devas esti komprenata kiel teoriisto de "kampo de fortoj",

ĉar li la unua donis ŝlosilon por komprenado de la strukturo de materio. Lia "Teorio de filozofio natura" estas unu el tre signifaj verkoj de la eŭropa novlatina kultura heradaĵo.

Marko Antun de Dominis, kroata matematikisto, fizikisto kaj filozofo, dum sia vivo devis suferi grandegan maljustaĵon, kio rezultis finfine per lia morto en malliberejo. Liaj verkoj kaj lia kadavro estis ĉe la fino ĵetitaj en la riveron Tibro en Romo. Li esploris disperson de la blanka lumo. Fakte blanka lumo konsistas el kontinua sinsekvo de ĉiuj koloroj de la videbla spektro, ekde la ruĝa ĝis la viola. Liaj esploroj, interalie rezultis, ke li interpretis la fenomenon de la ĉielarko. Granda fizikisto Isaac Newton komence de la 18-a jarcento atestis, ke la esplorado de Dominis pri la ĉielarko kaj liaj interpretoj de du dispersoj kaj refraktoj kaj de unu reflektado de lumo sur pluvgutoj, estis grandega malkovro.

Eble ni esperantistoj povus trovi fortojn por organizi pri ili en la jaro 2011 ian "rondan tablon", kies partoprenontoj ne devus esti nur E-lingvanoj sed ĝenerale homoj kiuj scipovas ion diri pri la scienca atingo de la triopo!

La 3-a ESPERANTO-BOATADO SUR LA RIVERO KUPA okazos de la

31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2011. Organizos ĝin kune la Esperanto-societoj el Sisak, Karlovac kaj Velika Gorica. Partoprenkotizo por plenkreskuloj estas 300,00 kunaĵoj kaj por infanoj ĝis 12-jaraj 150,00 kunaĵoj.

Pliaj informoj ĉe:

Sanja Damjanić en Karlovac: 091/584 96 69

Stjepan Žarina en Velika Gorica: 091/534 47 67

Srećko Radulović en Sisak: 099/243 33 52

Zlatko Boroš en Zagrebo: 091/894 71 57

ASPEKTOJ DE BALKANIO

Historio en la nuno de Sarajevo ĝis Tirano

  Ursula Schnelle-Moritz kaj Uwe Joachim Moritz

Prefere malfrue ol neniam

Dum la milito en Bosnio kaj Hercegovino (1992-1995), la pluekzistado de tiu ŝtato estis minacata ne nur far la enlandaj serboj, sed - en certaj periodoj - ankaŭ flanke de la bosniaj kroatoj. Ĉi ties armeo, la 9-an de novembro 1993, estis bombardante detruinta la “Turkan Ponton” el la jaro 1566. Admirante, en 2001, la restojn de tiu ĉi ponto en la urbo *Mostar*, ni promesis reveni, kiam la restaŭrado estos finita. La laboroj finiĝis, kaj en 2004 oni inaŭguris la grandioze renovigitan konstruaĵon (pagitan far Turkio), sed nia vizito prokrastiĝis ĝis septembro 2010.



La renovigita Turka Ponto en Mostar

La detruo de tiu ĉi ponto, cetero ne uzebla por aŭtoj, estis barbarajo, evidenta artifiko de psikologia militado. Ĉar la objekto havis nenian taktikan aŭ strategian utilon, sed la celo de ĝia forigo ja estis provo forviŝi gravan elementon el la konscio de la homoj: videblan memorigilon pri la kontribuo de la turka arkitekto *Hajrudin* al la kulturo. Estas imageble ke la kroataj armeanoj volis kontraŭmisiisme forskrapi kvincent jarojn el la historio de Bosnio kaj Hercegovino. Kia frenezaĵo!

Kiel fartas la homoj dek-kvin jarojn post milito?

En Sarajevo kaj Priŝtino, niaj du unuaj haltejoj, la militoj de 1992-1995 respektive de 1998/1999 estas videblaj aŭ palpeblaj tre klare, kvankam diversamaniere.



La nunaj ŝtatoj en la teritorio de la iama Jugoslavio

Bosnio kaj Hercegovino - ĉu eblas tri en unu?

Kompare al 2001, la aspekto de pluraj lokoj de nia limpasejo apud *Slavonski Brod* ĝis Sarajevo inkluzive evoluis pozitive. Malgraŭ la pluekzistado de multaj ruinoj, precipe en la kamparo, oni tuj vidas riparitajn kaj novkonstruitajn domojn kaj stratojn, kie promenas homoj tiel vestitaj ke fremdulo estas ĝojige surprizita. En la vendejoj abundas ĉiaj varoj,



Baščaršija, la plej malnova kvartalo de Sarajevo



kaj ne mankas aĉetemoj. Memkompreneble, ni tute ne scias ĉu tiuj impresoj korespondas kun la vera situacio de la socio. Ĉiukaze ni vidis ankaŭ almozpetantajn infanojn kaj plenkreskulojn.

Pligravas la nevideblaj spuroj de la militaj detruoj. La ŝtato Bosnio kaj Hercegovino troviĝas sub tre peza damokla glavo: La plimulto de la serbaj politikistoj ofte ripetas la minacon ke ili memstarigos la Serban Respublikon¹. Ĉar por tion atingi ili bezonas fortan subtenon flanke de la Respubliko Serbio, almenaŭ provizore tia evoluo ŝajnas ne realisma pro la klopodado de Serbio proksimiĝi al la Eŭropa Unio. La nuna bojkotado de multegaj projektoj far la serbaj radikaluloj paralizas nepre bezonatajn reformojn, kies efektiviĝo plifaciligus la vivon ankaŭ de la serbaj civitanoj. Pri ĉio ĉi ni havis ampleksan intervjuon kun profesoro d-ro *Safet Halilović*, la tutŝtata ministro pri homaj rajtoj kaj rifuĝintoj. - En tiuj sekvinta interparolado, la asista ministrino, s-ino *Saliha Džuderija*, detaligis kelkajn aspektojn: Antaŭ la milito en Bosnio kaj Hercegovino estis registritaj 17 etnaj minoritatoj, inter kiuj la plej ampleksaj estis la romaa, juda, ukraina, slovakaj kaj rumana; en Sarajevo agadas asocioj de italoj, slovenoj, germanoj kaj ĉeĥoj, dum ukrainoj kaj rumanoj vivas kompakte en la urboj *Prnjavor* kaj *Prijedor* (norda Bosnio). Nuntempe la nombro de minoritatoj, kompare kun la totalo de enloĝantoj, estas neglektebla. Karakterize por la disfalo de Jugoslavio okazis etna distavoliĝo kaj hegemoniigo de bosnoj, serboj kaj kroatoj kaj pligrandiĝo de tiu specifa "etna" kategorio deveninta el miksitaj geedzeco, kiuj iam deklaris sin "jugoslavo" kaj en la novaj cirkonstancoj nomas sin "bosnianoj". La romaoj, kiuj estas ĉirkaŭ 30.000 kaj ne havas metropolan ["patrinan"] ŝtaton, estas la plej granda problemo, kaj dum la Jardeko de la Romaoj la ŝtato dediĉas plej grandan atenton al plibonigo de la situacio de tiu minoritato. - Kvankam estas garantiata al la minoritatoj la rajto pri

instruado en la gepatra lingvo, tio ne estas ĝenerale realigebla pro la malgrandega nombro dise tra la lando. Tiujn lingvojn oni uzas por kultura aktivado, ekzemple, eldonado de literaturo, sed ilia uzado, kun tradukado, ĉe tribunalo estas garantiata. Laŭ la lasta popolnombro, en 1991, la minoritatoj estis 7.8% el la tuta civitanaro, el kiuj 5.5% estis "jugoslavo". Tio klarigas ke la minoritatoj ja havas kulturen kaj religian aŭtonomion, sed ne povas havi politikan aŭtonomion. - En la lerneja kampo oni zorgas ke la t.n. instru-kernoj ekskluzivas ofendajn enhavojn. La problemo ne troviĝas en temoj el la malproksima historio, sed ja el la nuntempo, t.e. la lasta milito, la sendependiĝo, la ŝtateco de Bosnio kaj Hercegovino ktp. Interretaj incidentoj, ekzemple, en medioj de lernejoj, estas nun tre maloftaj. En publikaj kulturaj aŭ sportaj eventoj ja okazas tiaj incidentoj instigitaj far certaj interesgrupoj esence naciismaj aŭ eĉ faŝismaj. En la parlamento oni provas akcepti projekton de leĝo malpermesanta novfaŝismajn insingojn kaj simbolojn de militkrimoj.



Akuzo rubandego en la tombarejo de Srebrenica-Potočari



Intervjuo kun prof. d-ro Safet Halilović

Ni povis viziti lokon, kie oni kreis imponan akuzilon de la indigniga masakrado, far serbaj armeanoj-krimuloj, de pli ol 8.000 bosnaj viroj kaj knaboj, senescepte civiluloj. Temas pri la granda, dece aranĝita tombarejo de *Srebrenica-Potočari* kie estas instalata muzeo de la teruraĵoj. Utilas memori ke tiu loko situas en la Serba Respubliko: Rande en la tombarejo pendas grandegaj rubandoj akuzantaj precize la serbojn kaj aliajn militagintojn pro la murdado kaj la maljustega "pac-kontrakto". Sub forta premo flanke de Usono tiu dokumento estis interkonsentita en *Dayton* (Usono) kaj subskribita la 14-an de decembro 1995 en Parizo far la prezidentoj de Bosnio kaj Hercegovino (*Alija Izetbegović*), Kroatio (*Franjo Tuđman*) kaj Serbio (*Slobodan Milošević*). La

¹ Nepras konscii pri la diferenco inter la "Serba Respubliko" (ĉefurbo: Banja Luka), kiu estas regata far la serboj en Bosnio kaj Hercegovino, kaj la "Respubliko Serbio" (ĉefurbo: Beogrado), kiu estas suverena ŝtato.



La tunelo sub la aviadilejo de Sarajevo

agreson far la serboj oni "rekompencis" per cedido de teritorio: La Serba Respubliko ampleksas 49% el la ŝtata surfaco, dum ilia procentaĵo de enloĝantoj estis en 1991, do antaŭmilito, nur 31,4 %; la Bosna-Kroata Federacio okupas 51% de la teritorio kaj konsistis tiam el 43,7% da muzulmanaj bosnoj kaj 17,3 % da kroatoj; la ceteraj civitanoj estis aliaj-etnaj.

Feliĉe, oni sukcesis savi kontraŭ forgeso elstaran faktoron de la kuraĝa rezistado de la sarajevanoj: la 800 m longan tunelon fositan en printempo 1993 sub la flughaveno de la ĉefurbo. Tiel ekestis la ebleco provizadi la urbon per nutraĵoj, medikamentoj kaj fuelo kaj transporti vunditojn kaj aliajn malsanulojn, eĉ mortintojn. Ĉio ĉi okazis sub konstanta kanonado far la serbaj sieĝantoj de Sarajevo. Inter la bosnaj oficiroj deĵorantaj ĉe la tunelo estis ankaŭ nia amiko *Senad Ĉolić*, kiu klarigis al ni plej aŭtentike la multajn ekspoziciaĵojn videblajn en la Tunelo-muzeo.

Kosovo, la plej nova ŝtato de Eŭropo

Kosovo kiel ŝtato ekestis maljam la 17-an de februaro 2008 per la parlamenta deklaro de sendependeco. El la 120 membroj de la parlamento 109 voĉdonis favore kaj 11... malĉeestis, inter ili la dek serbaj deputitoj. Ĝis la 18-a de decembro 2010 nur 72 el la 195 ŝtatoj de la mondo agnoskis la ekziston de tiu ĉi plej "juna familiano". Tiu rifuzo eksplikeblas sufiĉe simple per la timo de multaj politikistoj ke la memstariĝo de Kosovo povus esti modelo por, ekzemple, uĝuroj (Ĉinio), eŭskoj (Hispanio kaj Francio), noĥĉoj (ĉeĉenoj/Rusio) kaj aliaj etnaj minoritatoj kiuj sentas sin sub jugo de

alietna plimulto. La plej obstinaj neantoj de la nova fakto estas la kosovaj serboj, el kies 228.264 anoj en 1971 (18,4%) estis nombrita en 2006 malpli ol la duono: 111 .300 (5,3%). Jen paralelo kun la sinteno de la serboj en Bosnio kaj Hercegovino. La serbaj politikistoj asertas ke la "lulilo" de la serba popolo staris en Kosovo, kaj ili tiel pravigas la serban pretendon ke tiu "tero" eterne devas resti serba. Ĉu tia pensmaniero ne parencas ŝoke kun la Hitlera "tero-kaj-sango"-ideologio?

Kosovaj serboj apenaŭ integriĝas kaj miskomprenas la historion

En Kosovo la serboj ja vivas precipe en la norda parto de la dividita urbo *Mitrovicë / Kosovska Mitrovica*, pli norde ĝis la limo kun Serbio en la tri municipoj *Leposaviq / Leposavić, Zubin Potok kaj Zvečan / Zvečan*. Relative multaj serboj estas troveblaj inter *Prizren* kaj la *Sharr*-montaro kaj en la sudoriento de la lando inter *Ferizaj / Uroševac* kaj la limo kun Makedonio; en aro da municipoj, ankoraŭ, loĝas serbaj familioj protektataj far KFOR-taĉmentoj.²

Ĝis antaŭnelonge ankaŭ aliaj objektoj estis soldate ŝirmataj: la ortodoksaj preĝejoj kaj similaj konstruaĵoj. Unu el la plej famaj lokoj, la monaĥejo de *Gračanica / Gračanica* konstruita en 1321 kaj situanta ok kilometrojn ekster Prištino, okulfrape memorigas pri la danĝero minacanta ĉi-foje flanke de radikalaj albanoj: Sur la muro apud la enirejo restas rulaĵoj de pikdrato por malhelpi ripeton de la atakoj el la jaro 2004. Tamen, soldatoj ne plu deĵoras en la monaĥeja tereno. Tiu juvelo de religiaj arkitekturo kaj pentroarto feliĉe estas denove libere vizitebla, kaj vizito estas vere rekomendinda.

Eĉ mallongeco de halto en la ĉefurbo de Kosovo ne povus pravigi malatenton pri loko saturita de historio: la Kosova Kampo. Tie ĉi, la 15-an / 28-an de junio 1389³ la invadantaj muzulmanaj otomanoj estrataj de sultano *Murad* la Unua venkis la unuiĝintajn kristanajn armeojn komanditajn far la serba princo *Lazar*, sub kiu batalis same serboj kiel bosnoj, albanoj, bulgaroj, aromunoj kaj aliaj. Cetere, ambaŭ arme-estroj mortis ĉi-okaze. Laŭ la flogintaj legendoj, *Murad* estis murdita far la serba vasalo *Miloš Obilić* kaj *Lazar* estis punmortigita far la venkintoj.

En 1448 kristana armeo de madjaroj, serboj kaj aliaj, sub komando de *János Hunyadi*, la provizora estro de Hungario, estis neniigita far otomanoj en la sama Kosova Kampo. Tio neniel malhelpis la

² KFOR estas la mallongigo de "Kosovo Forces" (laŭvorte: Kosovo-fortoj), kiuj konsistas el armeaj unuoj de proksimume 10.000 soldatoj, sub komando de NATO, el pli ol 30 ŝtatoj kaj kiuj klopodas preventi armilajn incidentojn.

³ Ne fonfuziĝu pro la datoj: la 15-a de junio de la malnova, Julia kalendaro korespondas al la 28-a de junio laŭ la nova, Gregoria kalendaro.



ĵus elektitan prezidenton de la Respubliko Serbio, *Slobodan Milošević*, kunvenigi en la 600-a jartago post la unua ĉefe serba katastrofo proksimume unu milionon da serboj en tiu loko, kiu devus esti “nacia funebrejo”. La amasoj estis alveturigitaj per 5000 aŭtobusoj el ĉiuj partoj de Jugoslavio aŭ venis per dekoj da specialaj trajnoj, per miloj da privataj aŭtomobiloj kaj eĉ aviadile el okcidenta Eŭropo, Aŭstralio, Kanado kaj Usono. En sia polemikado kontraŭ la albanoj *Milošević* montris plian fojon sian veran vizaĝon minacante ke, se necesos, la serboj uzos ankaŭ armilojn por defendi la apartenon de Kosovo al Serbio. Resume, li donis al la amasego da aŭskultantoj la senton ke ili estas festantaj *venkon* atingotan kontraŭ muzulmanoj (= albanoj) venĝe pro la eventoj en 1389 kaj 1448. En 1953, sur la iama batakkampo estis starigita alta turo kun multaj tekstoj glorantaj la “heroojn” mortintajn por la patrujo. Tiucele ĉiun jaron multaj serboj pilgrimas al *Gazimestan* (la monumentejo en la Kosova Kampo) en “*Vidovdan*”, la tago de sankta Vito, t.e. la 28-a de junio, kaj KFOR- taĉmentoj devas protekti la manifestaciantojn.

Proksime de tiu loko troviĝas la maŭzoleo de la murdita sultano *Murad* kaj ankaŭ la tombo de turka standardisto.

Kutime neniu eksplikas la nomon de la Kosova Kampo. En diversaj lingvoj la nomo konsistas el la samaj elementoj “kampo” kaj “Kosovo”: *Fushë e Kosovës* (albane), *Kosovo polje* (serbe), *Kosowe Pole* (pole), *Kosovopole* (bulgare), *Cossovo-polie* (itale) kaj *Plaine de Kossovo* (france); en angla historia atlaso aperas simple *Kosovo*. Inter la konsultebaj verkoj nur kastilia enciklopedio mencias *Campo de los Mirlos*, kiu samsignifas kiel la germana *Amselfeld* (Kampo de la Merloj). Restas du demandoj: Ĉu “*Kosov-*” estas efektive derivita de la serba *kos*, kiu signifas “merlo”, kaj ĉu la birdoj supozeble amase tie viditaj vere estis merloj? Ĉu ili fakte estis monedoj (korvetoj)?

Albana malkontenteco, la serba nordo kaj kaoso

En Kosovo evidente kaj kompreneble tute ne ĉiuj albanoj estas kontentaj pri la politika evoluo. Promenante tra la ĉefurbaj stratoj oni vidas plurloke murskribaĵojn proteste kontraŭ la kuratoreco de la institucioj *UNMIK* kaj *EULEX* ⁴ de la “internacia komunumo”. Tiuj institucioj estas konsiderataj, flanke de ŝajne konsiderinda parto de la albanaj civitanoj, malamikaj kaj novkoloniismaj, ĉar mankas al ili demokratia legitimumo kaj ĉar la ŝtataj entreprenoj estas vendataj al privatuloj. La ĉefa reprezentanto de tiu tendenco estas la movado



Protesta murskribaĵo en Prištino

Vetëvendosje (sindeterminado), kies aktivistoj “kompletigis” la mallongigon *UN* sur aŭtoj kaj aliloke per du literoj: *F UN D* (fino) aŭ *T UN G* (Gis!).

Iusence Kosovo estas kaosa: En la serbe dominata nordo eblas pagi per la tutŝtate oficiala eŭro (!) kaj per la serbia dinaro; malgraŭ senlaboreco de inter 45 kaj 50 procentoj ne ekzistas sociala asekkuro, sed la serbaj senlaboruloj ja ricevas pagojn rekte el Beogrado; ĝis antaŭ malmultaj jaroj la serbaj instruistoj ricevis duoblan salajron, sed nun ili devas decidi el kiu kaso ili volas pagati, kaj la salajro, kiun Beogrado pagas al serba instruisto en Kosovo, estas pli alta ol tiu pagata al samprofesiulo en Serbio. Ofte videblas la ŝtata flago de Serbio. - Estas facile imageble, kvankam tute ne rekomendinde ke en albanaj lernejoj oni ne povas lerni la serban lingvon kaj inverse. - Bonŝanculoj estas tiuj homoj, kiuj ne bezonas serĉi straton en Prištino aŭ la vojon ie en la lando: Stratnom-tabuloj kaj voj-indikiloj estas raraĵo. Se la ŝtato kaj individuoj celas iompost-ioman kreadon de ekonomia bonfarto, turistoj povas utili, sed nepre necesas faciligi al ili al- kaj revenon per normalaj servoj. Kvankam ni spertis tra dekoj (!) da kilometroj vesperan veturadon sur dezerteca imagenda trako, kie tute ne rimarkeblis konstruaktiveco, ja estas esperige ke diversaloke ekzistas signoj pri transformiĝo de interurbaj stratoj.

En la centro de Prištino unu el la malmultaj stratnom-ŝildoj mirigis nin duoble: Unue, ni ne atendis straton kun la nomo de la nun malpremesita *UÇK* (*Ushtria Çlirimtare e Kosovës* - Liberiga Armeo de Kosovo), kaj, due, ni ne sukcesis facile solvi la enigmon de la meza el la tri surŝildaj mallongigoj *Rr. St.Ûl.*; ni ja konjektis ke la unua kaj la tria signifas *rruga* respektive *ulica*, tio estas “strato”. Nu, la meza

⁴ UNMIK: United Nations Interim Administration Mission in Kosovo (Provizora Administra Misio de Unuiĝintaj Nacioj en Kosovo); EULEX: European Union Rule of Law Mission in Kosovo (Eŭrop-Unia Misio por Jurŝtatigo en Kosovo).



*Afiŝego de Ibrahim Rugova
surmure en Priŝtino*

estas *street*: la angla estas kvazau tria oficiala lingvo apud la albana kaj la serba.

Nëna Tereza

De Priŝtino ĝis Tirano akompanis nin la nomo de fama virino aktivinta longan tempon inter la plej malriĉaj homoj de Kalkato (Barato). Ŝi naskiĝis antaŭ 100 jaroj en la makedona ĉefurbo Skopjo: *Gonxhe Bojaxhiu* nomata poste "Patrino" *Tereza*, certe la plej vaste konata albano. En la ĉefurbo de Kosovo ŝian nomon havas la larĝa, longa kaj agrabla bulvarado, en Skopjo ni trovis monumenton omaĝe al ŝi kaj apartan "Nacian Memorejon" pri ŝi, kaj fine, en Tirano giganta afiŝo en la centra placo anoncis ke la jaro de la 100-a datreveno de ŝia naskiĝo estas dediĉita al "Nëna Tereza" sub la speciala protekto de la ĉefministro de Albanio, *Sali Berisha*.

Ravaj moskeoj, derviŝejo, la germana lingvo kaj ... rubo, rubo, rubo

Nia antaŭlasta etapo estis la urbo *Tetovë*



*La nova bluega Kadi Ĉeshme-moskeo
en Tetovë*

en nordokcidenta Makedonio, kie komence ni sentis nin perditaj, ĉar laŭdire ne estis aĉetebla - ĉar ne ekzistis - tiu paperaĵo nepre bezonata de fremduloj: urbomapo. Feliĉe, la onidiro montriĝis maltrafa, kaj ni ricevis du (!) ekzemplerojn donace. Tuj nin surprizis la granda nombro da moskeoj kaj la beleco precipe de ilia interno. En la unua, kiun ni vizitis post preĝado far ne multaj viroj kaj pri kies multkolorco ni miradis, helpanto de la imamo rakontis multon pri la moskeo kaj sugestis ke *Uwe* surmetu imaman ĉapon: Kia aspekto eĉ fote dokumentita! Elstaras la *Kadi Ĉeshme*-moskeo komplete rekonstruita sur la loko de malnova muzulmana preĝejo. La lukse ekipita domo, en kies ekstero okulfrapas la superrega blua koloro, estis inaŭgurita kelkajn tagojn antaŭ nia alveno. La religia instruisto (*hoxha*) volonte respondis niajn demandojn. La ampleksan renovigon de tiu ĉi moskeo same kiel la modernigon de la granda lernejo "*Naim Frashëri*" kaj la restaŭron de la lernejo en *Bozovce* pagis la mecenato *Lazim Destani*, kiu devenas el tiu vilaĝo. Li fondis kaj estras la mondvaste agantan firmaon "*Ecolog*", kiu okupiĝas precipe pri servoj por armeanoj en Afganio (liverado de manĝaĵoj, lavado de vestaĵoj k.s.). Ni estis interkonatigintaj

kun *L.Destani* kaj lia kuzo *Aqeradin Ilazi* antaŭ pli ol tridek jaroj, kiam la unua havis malgrandan vojaĝagentejon en *Stolberg* (apud Akeno/Germanio) kaj la dua ŝoforadis autobuson inter *Tetovë* kaj *Stolberg*, kie laboris multegaj makedoniaj albanoj. Ni ĝuis du ampleksajn tagmanĝojn en tipaj restoracioj invitive far la du parencoj.

Kun nia amiko *Rexhep Ibishi*, kiu jam dum pli ol tridek jaroj vivas en *Stolberg* kaj kiu akompanis nin en Sarajevo ĝis nia adiaŭo en *Tetovë*, ni ekskursis en la tre proksiman *Sharr*-montaron por finfine vidi la vilaĝon *Bozovce*, la naskiĝlokon de nia amiko. Alian vojaĝeton ni faris kune al Skopjo. Tie ni renkontis - forme de granda monumento - la fratojn *Cirilo* kaj *Metodo* el *Tesaloniko*, la "apostolojn de la slavoj" kaj kreintojn de la glagolico, per kiu ili skribis la religiajn tekstojn tradukitajn en sian slavan dialekton.

Vizitante en *Tetovë* la iaman kaj renovigitan dervišan monaĥejon *Arabati Baba Teqe* nin alparolis eksmembro de la *UÇK* kaj nuna tiuloka sekurecofiscisto kaj klarigis aferojn de derviŝejo⁵.

En tiu ĉi tereno, kiel en multaj okazoj tra la urbo, niajn orelojn agrable frapis germanlingvaj sonoj el la buŝoj de personoj supozantaj ke ni bezonas ian helpon kaj de kelneroj kaj vendistoj. Nu, el Makedonio, la "malriĉulejo" de la iama Jugoslavio, multegaj homoj serĉis laboron eksterlande, interalie en Germanio.

Unu fenomeno ŝokis nin en tiu makedonia urbo (kaj bedaŭrinde ankaŭ aliloke): la neimagebla kvanto da rubo ĵetita kien ajn rande de multegaj stratoj ekster la veraj urbocentroj. Oni povus pensi ke la homoj forĵetas plastajn saketojn, malplenajn botelojn, pakumojn k.s. prefere *apud* ne plenajn rubokonteneretojn aŭ tien, kie ŝildoj eksplicite malpermesas tian malrespektadon de la naturo kaj de la kunhomoj!

Ni estis tre kontentaj nenion legi, nenion aŭdi pri intertnaj problemoj en Makedonio. Jes ja, estas konate ke, antaŭ aro da jaroj, ankaŭ en tiu ĉi ŝtato okazis fizikaj, armilaj interbataloj de albanoj kaj makedonoj, sed niaj surlokaj impresoj estas resumeblaj per la konstato ke albanoj kaj makedonoj sukcesis taŭge kompromisi tiel ke jen unu, jen alia albana partio partoprenas en la registaro. Konkrete tio signifas ke en la regiono loĝata de albanoj ilia lingvo estas kunoficiala lingvo kaj absolute normala instrulingo de la elementa lernejo ĝis la universitato. Gratulon al ambaŭ flankoj!

Albanio survojas al Eŭropo

Bonŝancaj ni estis ke la UEA-delegito en Tirano, *Bardhyl Selimi*, oficis kiel nia ĉiĉerono kaj ĝenerala helpanto, precipe por tradukado, same kiel

tion estis farinta nia longjara amiko *Senad Ĉolić* en *Sarajevo*, *Mostar* kaj *Srebrenica*.

Pri la situacio de la greka, makedona, montenegra-serba kaj aliaj etnaj minoritatoj en Albanio same kiel pri la situacio de la albanoj en la najbaraj landoj ni povis intervjui s-ron *Qiriako Qirko*, la direktoron de la sekcio pri minoritatoj kaj homaj rajtoj en la albania ministerio pri eksterlandaj aferoj. La intervjuato substrekis ke nun la etnaj minoritatoj (grekoj, makedonoj, valaĥoj [aromunoj], serboj/montenegranoj kaj romaoj) en Albanio ĝuas ĉiujn kulturajn, ekonomiajn kaj politikajn rajtojn, kvankam iliaj nombroj estas malgrandegaj: sume, ili konisistigas malpli ol 3 % el la tuta civitanaro. Gravega problemo estas la financado de instruado pri kaj en la minoritataj lingvoj, ĉar la eldonkvanto de lernolibroj estas tre malgranda. Tial la registaro de Albanio interkonsentis/-os kun la koncernataj eksterlandaj registaroj por produkti la librojn en tiuj landoj laŭ la albanaj instruprogramoj. La greka registaro malfermis multajn privatajn lernejojn por greklingvuloj en Albanio. En la universitato de la sudalbania urbo *Gjirokastër* jam dum 40 jaroj estas preparataj instruistoj por la grekaj lernejoj. Fine,



S-ro Qirko, B. Selimi kaj U. J. Moritz dum la intervjuo

s-ro *Qirko* emfazis ke Albanio nepre volas aliĝi al la Eŭropa Unio, sed ke ĝi samtempe insistas pri konservado de sia etna identeco.

La ĉefurbo tute nature prezentas abundon da interesaj lokoj, sed dum restado de kvin tagoj eblas konatigi al si nur etan parton. Ni estis scivolaj pri la vastega centra placo, kies foton ni estis vidintaj en libroj. Kia seniluziigo! La tuta areo estis trafosata por "ekzili" ĉian aŭtotrafikon de tie. Meze en la placo ne pretervideblas monumento de la rajdanta *Gjergj Kastrioti* nomata *Skëndërbeu* sub la nigra-ruĝa flago. Tiu ĉi "Sinjoro Aleksandro" (= *Skëndërbeu*) estis tra pli

⁵ Atentu ke en PIV la klarigo pri derviŝo estas misa: Ekzistas diversaj derviŝaj ordenoj, el kiuj unu estas tiu de la "dancantaj derviŝoj". Ne ĉiuj derviŝoj estas vagantoj, sed almenaŭ origine ili estis almozpetantoj. La termino "derviŝo" devenas el la araba kaj signifas "malriĉulo"; persoj kaj turkoj peris ĝin al hindoeŭropaj lingvoj.



“Etna Albanio” - slogano videbla sur multaj muroj

ol 500 jaroj kaj certe pluestos la elstara identigilo por etnokonsciaj albanoj en kaj ekster la aktuala ŝtato Albanio. Li sukcesis unuigi almenaŭ plurajn albanajn princojn kaj de 1443 ĝis 1468 gvidis la rezistadon kontraŭ la otomana superpotenco fine venkonta.

En la Nacia Historia Muzeo en Tirano kaj en la Nacia Muzeo *Gj.K.S.* en *Krujë* (proksimume 30 km nordokcidente de la ĉefurbo) ni povintus ekhavi vastan superrigardon kaj enkondukon en la historion de Albanio kaj tiu regiono de Balkanio, se ... ekzistus eksplikoj ankaŭ en alia lingvo ol la albana. Tiu ekstreme bedaŭrinda manko estas unu el la multaj signoj montrantaj la longegan vojon trapasendan far Albanio antaŭ ol alveni en Eŭropo. La saman konkludon ni devis fari en nia multekosta hotelo, en kiu dum pluraj manĝoj ne eblis interkompreniĝi kun la kelneroj por diri ion pli substancan ol *Mirëmëngjes. Shumë faleminderit. Ska gjë. Mirupafshim.* (Bonan matenon. Multan dankon. Ne dankinde. Gis revido.) kaj similajn ĝentilajetojn. Eventuale la albana poŝto pli rapide ol alilandaj adaptiĝis al la “moderna” interkomunikado kaj tute ne starigis poŝtkestojn aŭ jam forprenis ĉiujn. Nu, serĉu poŝtoŝtationojn ...

La viziton al *Krujë*, la potenca bazo de *Skënderbeu* kaj portempa “ĉefurbo” de kreiĝanta albana ŝtato, ni kombinis kun mallonga rigardo en la havenurbon *Durrës*. Tie la naftocisterno jiom minace najbaras al la strando. Ĉi tie ĉu ili, ĉu grekoj fondis urbon en 627 antaŭ nia erao kun la nomo *Epidamnus*, nomata jarcentojn poste far romianoj *Dyrracchium* kaj mezepoke far venecianoj *Durazzo*. Por elfosi la ampleksajn restojn de amfiteatro meze en ĉi tiu urbo necesis malkonstrui aron da domoj, kaj el turisma vidpunkto estas tre dubinde ĉu la rezulto valoris tiajn detruojn.

En Tirano ekstreme ĝenis nin la efektive minaca kaj malsaniga ŝoformaniero de la plejmulto de la aŭtomobilistoj, kaj ni ankoraŭ ne komprenas ke ni mem ne havis akcidenton kaj eĉ ne vidis pli ol unu malgravan. Same malbonfartigis nin ke en neniu



Projekto “Unu urbano - unu arbo” - ĉu tiel ĝermas ekologia konscio en Tirano?

restoracio malestis bruego el televidilo au “muziko” el laŭparoliloj ŝajne aŭskultata far neniu ĉeestanto.

Epiloge

Sub preskaŭ ĉiam brila suno ni travivis multajn interesajn renkontiĝojn, vidis plejofte belan naturon kaj aŭdis pri amaso da nekonataĵoj. Sed ni konkludis ke vojaĝo tra pli ol 5.500 km en aŭto dum 27 tagoj ja ne nepre rekomendeblas. Ĉiukaze ŝajnas al ni ege preferinde koncentri sin al unu lando (aŭ maksimume du), kiu(j)n dum tiom da tempo oni povas pli detale ekkonni.

Plej sincere ni dankas al ĉiuj homoj, kiuj ebligis al ni malkovri ĉion ĉi.



HUNGAROJ OMAĜIS AL JULIO BAGHY

Jolanda Józsi

En Szeged (Hungario), la 15-an januaro 2011, la hungaraj esperantistoj omaĝis al Julio Baghy (1891-1967), la mondfama Esperanto-poeto kaj verkisto, okaze de la 120-jara datreveno de lia naskiĝo. La renkontiĝon organizis la Esperanto-societo Julio Baghy el Szeged kun sia prezidanto, s-ino Ildikó Ferenczi kaj la vicprezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, Jozefo Baksa.

“Amo kreas pacon, paco konservas homecon, homeco estas la plej alta idealismo”. Sub tia slogano en Szeged kunvenis pli ol 50 geesperantistoj el Rumanio, Serbio kaj Hungario por festi la memortagon de Julio Baghy.

La renkontiĝo estis la rara ebleco viziti la Grandan Bibliotekon “Somogyi” en Szeged, kun la celo vidi la sektion pri Esperanto kaj la ekspozicion memore al Julio Baghy.

Poste estis aranĝita la meto de folkronoj ĉe la memordomo de Julio Baghy, flanke de la Esperanto-societo el Szeged, Hungario, Esperanto-Asocio de Oradea, Rumanio, kaj Esperanto-societo el Senta, Serbio.

La partoprenantoj kolektiĝis en la sidejo de la Esperanto-societo en Szeged, kaj kontribuis al la kultura programo pri la vivo de Baghy. Teatraĵon de Baghy prezentis gastoj el Serbio, kaj s-ino Jolanda Józsi el Rumanio, prezidantino de Internacia Esperanto-Kultur-Turismo parolis pri merito de la granda ĝemelstela paro Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. Ŝi parolis pri la unua romano de Baghy (“Printempo en la aŭtuno”), verkita en unu semajno al la ĉina verkisto, Bakin, kiu ĉinigiĝis ĝin, allogante per tio multajn lernantojn al Esperanto, inter kiuj ankaŭ Chen Juan. La romano kun grandega sukceso

inter junularo, aperis 17-oble represita. En ĝi eksonis la forta voko de Baghy, nutranta la novan kulturan movadon. En Szeged sekvis deklamadoj de s-ino Jolanda Józsi, el poezioj de Baghy, ekzemple de “Aŭtuna kanto” kaj “Ne plu militon” (li estis ankaŭ granda patrioto alvokanta ĉiujn al paco). Samtempe ŝi prezentis fragmenton pri L.L.Zamenhof el verko de Baghy “La verda koro” (1920), montrante emociajn momentojn dum la unua kongreso en Bulunjo sur Maro, substrekante la personecon de

Zamenhof, kiu oferis sian tutan vivon por la homaro. La homoj komprenis lin kaj lian grandan verkon.

Al la programo en Szeged kontribuis ankaŭ s-ro János Csapó, kaj s-ro Makkai kontribuis per poezio de Baghy.

S-ro Jozefo Baksa, vicprezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, prezentis la lumdiskon pri la 1-a IRIS-festivalo okazinta en Zalaegerszeg, Hungario, kun partopreno de diverslandaj esperantistoj en riĉa kulturprogramo.

Sekvis, babilado, interparoloj pri planoj, projektoj, gustumado de varmega vino, teo, sandviĉoj, kaj adiaŭo.

Ĉiuj ĉeestintoj ricevis dankdiplomojn pro sia partopreno.



La partoprenintoj

MINISTERIO PRI KULTURO DE RESPUBLIKO KROATIO decidis subteni la gazeton “Zagreba Esperantisto” per 15.000,00 kunaĵoj, kio kune kun aliaj sponsoraj sumoj garantios ĝian aperadon en 2011. Ni planas eldoni 6 numerojn kaj rekapti la eldonritmon.

JUNULARO AKTIVAS EN HANOJO, LA URBO DE LA UK 2012

✍️ *Augusto Casquero*



la gelernantoj ofte diras al mi: “Bonvolu iri malrapide”. Sed ĉi tie okazas inverse. Ili diras: “Rapide, rapide, ni devas fini la libron tuj”. Granda plezuro estas instrui en ĉi tiaj kondiĉoj.

Interesa fenomeno estas ankaŭ, ke vjetnamoj detruas pedagogiajn teoriojn kiuj diras, ke post 50-jariĝo homoj ege malfacile lernas novan lingvon. Unu el la grupoj kiu lernas kun mi konsistas el maljunuloj inter

**Sur la maldekstra foto:
La instruisto Augusto
Casquero kun siaj vjetnamaj
gelernantoj de Esperanto**

Nuntempe mi troviĝas en Hanojo, Vjetnamio, post mia 4-jara instruado de Esperanto en Kantono, Ĉinio.

Ekde la komenco mi ege surpriziĝis pro la alta nivelo de Esperanto ĉi tie. Multaj homoj entuziasme lernas nian lingvon, kaj ankorau estas multaj kandidatoj por leni ĝin.

Momente mi instruas Esperanton al du grupoj de universitataj gestudentoj, al alia grupo kiu konsistas el instruistinoj de infanĝardeno en kiu okazos la Infana Kongreseto, al du grupoj de miksitaĝoj, kaj baldaŭ mi komencos instrui Esperanton al tria grupo de universitataj gelernantoj.

Kion mi vidis ĉi tie estas, ke homoj ne nur ŝatas lerni la lingvon sed, diference de aliaj lokoj, ili havas Esperanton en la koro ekde la komenco. Ne oni bezonas konvinki ilin. Ili entuziasme kaj tre rapide lernas kaj volas tuj esti parto de la movado, helpi ĝin kaj kunlabori kiel volontuloj en la organizado de la Universala Kongreso, okazonta en Hanojo en la jaro 2012.

Kaj, ankaŭ diference de aliaj mondopartoj, ili ŝatas



**Sur la supra foto (de maldekstre):
Trang, Animo, Flama Floro, Raquel kaj Majo.**

paroli Esperanton. Ili tute ne emas krokodili. Ĉiuj volas tuj komenci uzi la lingvon. Tio multe plifaciligas mian laboron kaj kuraĝigas min.

Kompreneble, por mi tio estas granda plezuro. Generale, kiam mi instruas Esperanton,

65- kaj 93-jaraĝaj. Kiom ĝentilaj ili estas, kiel entuziasmaj, kiel diligentaj! Jam ĉiuj, post mallonga tempo, paroletas en Esperanto. Kompreneble, mi ne devas tion kaŝi, ili havas altan kulturalan kaj profesian nivelon (armea kuracisto, kolonelo; universitataj

profesoroj; inĝenieroj, ktp). Certe ili estos granda helpo en la organizado de la UK.

Kaj kion diri pri la vjetnama junularo? Mirinda ĝi estas! Ili ne estas la estonteco de la movado, sed jam ĝia realaĵo. De ĉiuj miaj junaj gelernantoj mi mem lernas multe. Ili rapidege lernas la lingvon, kaj ĉiuj estas lingvotalentaj. Ĉiuj havas Esperanton en la koro. Laborante kun ili mia koro plijuniĝas. Kelkaj el ili jam multege laboris ĉi tie en la organizado de naciaj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj,

kiel IJK, Tutazia Kongreso, Komuna Seminario k.a. Ilia helpo estos ege valora por la UK. En tio multe helpis Flama Floro kaj Belinda (Nguyễn Hoàng Yên, prezidantino de Vjetnama Esperanto-junularo), entuziasmaj kaj kapablaj knabinoj.

Speciale mi volus mencii Raquel. Ŝi havas hispanan nomon, ĉar en la Universitato de Hanojo ŝi estas studentino de hispana lingvo, kiun ŝi perfekte parolas. Meze de januaro, okaze de la lerneja vintra feriado ŝi decidis partopreni rapidkurson en Ĉinio,

en la urbo Kantono, sub la gvido de la usona profesoro Dennis Keefe. La rezulto estis mirinda kaj nekredibla. La kurso daŭris unu monaton (po ok horoj tage). Dum tiu tempo Raquel akiris tre altan nivelon en la kono de Esperanto. Fakte, kiam mi konatiĝis kun ŝi, ŝi ĉiam parolis kun mi en la hispana lingvo, sed nun, kiam ni renkontiĝas, al ŝia buŝo venas nur Esperantaj frazoj.

Baldaŭ ŝi komencos instrui Esperanton, kaj ŝi multege helpas en la organizado de la kursoj de Esperanto.

AŬSTRALIA ESPERANTISTINO EN SPLIT

Estrarkunvenoj de Esperanto-societo "Split" okazas la lastan vendredon en ĉiu monato. Unu el ili estis vizitita de aŭstralia esperantistino Nicole Else el Sidnejo.

La estimatan gastinon ni informis pri la historio de la Movado en Dalmatio kaj Kroatio, kaj pri ĝeneralaj movadaj problemoj. Ĉi-okaze la prezidantino de la societo Etel Zavadlav kaj la aŭstralia gastino raportis pri la vizititaj kulturhistoriaj kaj turismaj vidindaĵoj de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj pri la ekskurso al la proksima insulo Braĉ, kie ilin gastigis la membro de nia societo s-ro Ivica Šćepanović. S-ino Else abunde nin informis pri la Esperanto- movado en Aŭstralio, precipe en Sidnejo, kie ŝi estas unu el la plej aktivaj membroj. Post la reveno al Aŭstralio, ŝi sendis al ni siajn impresojn pri la vizito.

"Mi decidis vojaĝi al Kroatujo de la 1-a ĝis la 16-a de februaro por renkonti mian leteramikinon Etel Zavadlav. Etel estas 42-jara verkistino, kiu tre ŝatas verki novelojn kaj poemojn en Esperanto. Unu el ŝiaj noveloj estis pasintjare eldonita en la libro 'Vizaĝoj'. Pliaj ŝiaj noveloj kaj poemoj aperis en diversaj revuoj kiaj *Literatura Foiro*, *Femina*, *Heroldo de Esperanto* ktp. Melburnanoj iomete konas ŝin, ĉar Franciskam (Toubale, *noto de la redakcio*) prezentis skeĉon verkitan de Etel dum la Zamenhofa festo en 2009.

Jam dum pli ol 8 jaroj mi ne vojaĝis eksterlanden kaj ne flugis. Estis do agrable eniri aviadilon. Unue mi flugis al Frankfurto. En Frankfurto mi restis kelkajn horojn. Mi eliris el la flughaveno kaj kun surprizo vidis, ke ĉio estas kovrita de neĝo kaj ege malvarmis. Mi faris kelkajn fotojn kaj rapide reeniris la varman konstruaĵon de la flughaveno. De Frankfurto mi flugis rekte al Split. La flugo estis ege bela, ĉar videblis neĝokovritaj montoj kaj poste multaj kroataj vilaĝoj ĉe marbordo.

Kiam mi alvenis al Split, mi busis al la urbocentro, kie Etel atendis min. Finfine ni do povis persone babilu kaj kune ekskursi. Aparte menciinda estas la

Davor Grgat kaj Nicole Else



Nicole Else kaj Etel Zavadlav

ekskurso al Salona. Salona estis granda romia urbo konstruita antaŭ proksimume 2000 jaroj. Ĝi enhavis pli ol 50.000 loĝantojn. Bedaŭrinde, ĝi estis invadita dum la 7-a jarcento, kaj la loĝantoj fuĝis al Split. Tamen, nuntempe pri la urbo atestas ĝiaj ruinoj. Alia bela ekskurso estis la ekskurso al la insulo Braĉ. En grandega pramŝipo Etel kaj mi veturis al Supetar (45-minuta ŝipveturo). De tie ni busis al vilaĝo, kie loĝas esperantisto, membro de Pasporta Servo. Ĉe tiu gastama esperantisto ni tranoktis dum 2 noktoj, promenis en tre ŝtona trankvila regiono kaj multe babilis.

Mi ĉeestis ankaŭ Esperanto-kunvenon en Split. Tamen la loka grupo ne ŝajnas tre vigla. Ĉeestis nur 4 esperantistoj. Mi estis intervuata kaj eble tiu intervujo aperos ie kun foto.

Tro rapide forpasis miaj 11 tagoj en Split. La lastan tagon ni supreniris la monteton Marjan, de kie oni povas bele spekti la urbon Split.

Konklude, mi tre ĝuis pli bone konatiĝi kun Etel kaj vidi landon, kiun mi ankoraŭ tute ne konis. Mi esperas revidi Etel post kelkaj monatoj en Sidnejo, kie ni planas kunlabori por filmprojekto".



 Redakcia kompilo

KATASTROFO DE JAPANIO



La 11-an de marto 2011 je la 14h46 laŭ loka tempo, Japanion trafis fortega tertremo. La lando kiu vivas en konstanta danĝero de naturaj katastrofoj, kaj kiu verŝajne estas la plej bone ekipita por tiaj statoj, tamen travivis nevideblan detruon. La tertremo kies epicentro troviĝis en la Pacifika oceano, ĉirkaŭ 130 kilometrojn oriente de la marborda urbo Sendai, havis la magnitudon de 9,0 gradoj.

Tamen, ne la tertremo mem kaŭzis tiom ampleksajn detruojn, sed la cunamo per ĝi kaŭzita. Kvankam Japanio konstruis altajn kontraŭcunamajn digojn, la kalkuloj de fakuloj ne antaŭvidis tiom fortan cunamon, kaj la digoj ne sukcesis savi la urbojn kiuj troviĝis sur ĝia vojo.

La rezulton de la detruoj estos malfacile kalkuli. Pli ol 30.000 homoj estas mortintaj aŭ malaperintaj, kaj ĉirkaŭ 180.000 rifuĝintaj. Rektaj materiaj perdoj estas grandegaj eĉ por riĉa lando kia estas Japanio, sed nerektaj, ekzemple perdo de produktado, estas nekalkuleblaj. En la nerektajn oni kalkulas ankaŭ la postsekvojn de radiado pro la eksplodintaj reaktoroj de atomcentralo en Fukuŝima. Japanio estas la tria en la mondo laŭ nombro de nukleaj reaktoroj (54), kaj la katastrofo de la nuklea elekotrejo de

Fukuŝima kaŭzis enorman radiadon, kompareblan kun la radiado kaŭzita per atombomboj de Hiroŝimo kaj Nagasaki.

Esperantujo pri la katastrofaj eventoj estis informita ĉefe dank' al japana esperantisto Hori Jasuo, kaj parton el lia taglibro ankaŭ ni represas. Feliĉe, neniu el la japanaj esperantistoj troviĝas inter la viktimoj de la katastrofo.

Siajn mesaĝojn en tiu terura momento por la japana popolo, sendis ankaŭ pluraj kroataj esperantistoj. Al la deziroj por rapida reconstruo de la lando kaj reveno en la normala vivo, aliĝas ankaŭ nia redakcio.

 **HORI Jasuo**

RAPORTOJ PRI LA TERTREMO EN JAPANIO

La 12-an de marto

Ellitiĝinte mi tuj ŝaltis la televidilon. Mi supozas, ke ĉiuj TV-stacioj dumnokte kaj sen reklamoj elsendis la programon pri la tertremo. Mi neniam vidis aliajn programerojn, nek aliajn novaĵojn.

La unua bildo, kiun mi rigardis, estis tiu de la urbo Rikuzen-Takada kun la loĝantaro de 28.000. En la bildo nenio restas krom kelkaj grandaj betonaj konstruaĵoj. La pejzaĝo estas kvazaŭ la bildoj de Hiroŝima kaj Nagasaki post la eksplodo de la atombomboj en 1945. La urbo estis gardata per kelkmetrojn alta digo, sed la ondego facile superis ĝin kaj detruis la tuta urbon.

Sekvis aliaj bildoj, en kiuj simile montriĝis detruitaj urbetoj kaj vilaĝoj. Ĉar laŭ la bordo de tiu regiono frontanta al Pacifika Oceano estas malgrandaj golfoj, kutime tre sekuraj kontraŭ tajfunoj, sed cunamo facile viktimitiĝi tiujn vilaĝojn kaj havenojn, ĉar ĝia ondego koncentriĝas pli kaj pli, farante pli kaj pli grandan ondon al la profundo.

Aperas bildoj de izolitaj konstruaĵoj ĉirkaŭataj de restanta marakvo, sur kies tegmento estas la literoj de SOS, bildoj de elreliĝintaj kaj falintaj vagonoj kaj maltrankvilaj mienoj de rifuĝintoj.

Post la tagmanĝo mi ekstereniris. Hodiaŭ estas sabato, do kutime mi vidas multajn biciklistojn sur la biciklista vojo, sed hodiaŭ neniam. Ŝajnas al mi, ke la tuta kvartalo funebras.

Mi telefonis al esperantistoj en la urboj Sendai kaj Hukuŝima, kaj mi sukcesis kontakti unu en Hukuŝima. Ŝi diris: "Kiam okazis la tertremo, mi ĵus finis la butikmadon kaj estis ekster la vendejo, kaj mi sentis, kvazaŭ



mi malsaniĝus, ĉar mia korpo tiom ŝanceliĝis. Via telefono estas la unua post la tertremo.”

Posttagmeze venis terura novaĵo: oni eligis aeron enhavantan nukleaĵon el la centralo de Fukuŝima. Mankis akvo por malvarmigi la nuklean centron, kaj la premo de la aero en la ujo estis tiel alta, ke ĝi povos detrui la ujon mem. Por eviti tion, oni ellasis la aeron por malaltigi la premon. La aero konsistas el 90-oble pli densa nukleaĵo ol la normala. Mi ofte diris al miaj studentoj, ke ŝajne Japanio prosperas, sed se okazus grava akcidento de nuklea centralo, tia prospero estas momente malaperus. Tiu timo, kiun mi jam longe havis, povus fine efektiviĝi.

Je la 3h36 okazis eksplodo en la unua nuklea centralo de Fukuŝima, kaj la registaro klarigis, ke la kovrila domego de la centralo estis detruiita kaj ke en ĝi okazis solviĝo de la nuklea bastono en la mezo de la centralo. Evakua zono pligrandiĝis ĝis 20 kilometroj radiuse. En la televida bildo tiu centralo estas kvazaŭ skeleto kaj la supra parto de la konstruaĵo estas malaperinta. Nukleaĵo povas rapide disvastiĝi, do la danĝero povos veni ne nur al la loĝantoj ĉirkaŭ la centralo, sed ankaŭ al ĉiuj japanoj, kaj eĉ al koreoj, ĉinoj kaj tajvananoj.

Je la 5a horo la nombro de mortintoj kaj malaperintoj estis 1600.

La registaro petas, ke ĉiuj ŝparu elektron, ĉar multaj elektraj centraloj estis difektitaj kaj manko de elektro estas antaŭvidata. En multaj nordaj gubernioj elektro haltis kaj oni vivas en mallumo. Laŭ la novaĵo je la 21a, 1,1 milionoj de familioj ne ricevis elektron. En multaj lokoj gas-servo kaj akvo-livero haltis. En multaj rifuĝejoj viktimoj vivas sen sufiĉe da manĝaĵoj, akvo, varmo, kovriloj. Oni ne povas atingi tiujn pro la damaĝoj kaj blokaĵoj de vojoj.

Jam baldaŭ estos noktomezo. Mi finis vespermanĝon, banadon kaj estas preta enlitiĝi, sed mi ne povos endormiĝi trankvile, ĉar mi havas peksenton pro mia normala vivo. Mi finos la duatagan raporton.

La 13an de marto

Mi ellitiĝis je la 7a kaj tuj ŝaltis la televidilon. Mi tre timis la malboniĝon de la funkcio de la nukleaj centraloj. Jam en la lasta vespero, okaze de la eksplodo de la kovrila domego de la unua centralo, 150 homoj estis surverŝitaj per eliginta nuklea gaso. La registaro diras, ke tiu kovrilo estas simpla kovrilo kaj ne rilatas al la grava akcidento, sed ĉu tio estas vero?

Televido diris, ke ankaŭ en la tria centralo ekestis malbonordo pri la malvarmigo. Je la 9h08 por malvarmigi la reaktoron oni komencis enverŝi akvon ĉirkaŭ ĝi, sed tio ne glate iris, do oni antaŭvidas la eblecon de eksplodo same kiel en la unua centralo.

La registaro diris, ke ankoraŭ ne ekzistas rimedoj por haltigi la reaktorojn, kaj ke 70-80 mil

loĝantoj ĉirkaŭ la centraloj devos evakuiĝi.

Tagmeze venis telefono de mia amiko en Honkongo, kiu planis viziti min la 23an de marto. Li diris, ke liaj familiaj rekomendas, ke li ne iru al Japanio pro la nukleaj akcidentoj. En televido oni raportis, ke en Eŭropo en multaj ĵurnaloj tiuj akcidentoj de la nukleaj centraloj estis la plej grava novaĵo.

Posttagmeze mi provis telefoni al esperantistino en la urbo Morioka en la gubernio Iŭate, kaj sukcesis kontakti ŝin. Ŝi diris, ke ĵus elektro kaj telefono ekfunkciis kaj mia telefonvoko estas la unua. Ŝi diris, ke ŝi spertis nekutime teruran tertremon la 9an, du tagojn antaŭe, kaj sentis, ke io ne ordinara okazos.

Vespere la registaro klarigis jenajn aferojn:

1. La grandeco de tiu tertremo havis magnitudon de 9,0 gradoj laŭ la rekalkulo de la forteco. Jen estis la plej fortaj tertremoj de la 1950-aj jaroj: 1952 Kamĉatko 9,0 gradoj, 1957 Aleŭtoj 9,0 gradoj, 1960 Ĉilio 9,4 gradoj, 1964 Alasko 9,4 gradoj, 2004 Indonezio 9,0 gradoj kaj en 2011 Japanio 9,0 gradoj.

Ĉi-foja tertremo estis kaŭzita per la moviĝo de la tavolego 500 kilometrojn longa kaj 200 kilometrojn vasta, kaj daŭris pli ol 5 minutojn.

2. Damaĝoj konataj ĝis la vespero: 1049 mortintoj, pli ol 1000 malaperintoj, pli ol 10 vilaĝ(et)oj malaperintaj, 5700 frakasitaj domoj, 310.000 rifuĝintoj en 1893 rifuĝejoj.

La poliestro de la gubernio Mijaĝi esprimis sian prognozon, ke nur en lia gubernio mortintoj superos la nombroj de 10.000. Li povas esti prava. En la urbo Minami-Sanriku 10.000 el 17.000 loĝantoj malaperis. En tiu urbo la du-etaĝa urbodomo tute malaperis kaj la 4-etaĝa betona hospitalo estis inundita ĝis la kvara etaĝo. En la urbo Rikuzen-Takada 15.000 el 23.000 loĝantoj malaperis kaj 5.000 domoj estis tute frakasitaj. Certe estas aliaj vilaĝetoj laŭ tiu marbordo, kiujn oni ankoraŭ ne povas kontakti, kaj tie estas senhelpaj viktimoj.

Al tiuj rifuĝintoj mankas benzino, petrolo, elektro, gaso, akvo, kovriloj, medikamentoj kaj manĝaĵoj. La surteraj vojoj estas blokita per betonaj kaj lignaj rubaĵejoj, do oni planas transporti la necesajn el la mara flanko, helpe de la japana defendkorpuso kaj eĉ de la usona aviadilŝipo *Donald Regan* kaj aliaj militŝipoj.

3. Manko de elektro

Ne nur en la damaĝitaj regionoj sed ankaŭ en aliaj gubernioj ĉirkaŭ Tokio mankos elektro, ĉar multaj elektraj centraloj estas damaĝitaj. Por konkerti tiun malfacilon la registaro instrukiis al la Elektro Kompanio Tokio, ke ĝi liveru elektron vice de unu distrikto al la alia, kaj al kompanioj kaj la popolanoj, ke ili ŝparu elektron.

Vespere la ĉfministro Kan aperis en televido kaj esprimis sian kondolencon kaj kompaton kaj petis kunlaboron de la tuta popolo, apelaciante: “Japanio povas certe venki tiun malfacilegon!”




NOVA FAZO EN LA HUNGARA-KROATA KUNLABORO

 Josip Pleadin

Ekde la ekesto de Esperanto, la ligoj inter hungaraj kaj kroataj esperantistoj estis multaj kaj intensaj, kaj donis abundajn fruktojn. Por priskribi tiun parton de la Esperanta historio en niaj landoj, necesus verki apartan libron. Dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, ni trovis nin sursojle de nova fazo en la hungaraj-kroataj rilatoj.

Kiel "unuaj hiruondoj", hungaraj esperantistoj komencis vizitadi la verkistan renkontigon en la bieno Hrašćina, kaj la kroataj sekvis la tradiciajn renkontigojn de la najbaroj. Kroatoj partoprenis la IRIS-festivalojn, la esperantistoj el Osijek daŭrigis la tradician kunlaboron kun la esperantistoj en la hungara urbo Pécs, kaj lastatempe ankaŭ la prezidantino de KEL, Judita Rey Hudeček partoprenis kelkajn aranĝojn de la najbaroj.

Post ĉio ĉi ne surprizas ke Hungaria Esperanto-Asocio proponis subskribi Interkonsenton pri partnera kunlaboro inter Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) kaj Kroata Esperanto-Ligo (KEL). La teksto de la Interkonsento, proponita de HEA, estis dissendita al la estraranoj de KEL, kaj aprobita. En sia 2-a punkto ĝi mencias interŝanĝon de vizitoj dum la landaj kongresoj en ambaŭ landoj, sekve ŝajnis, ke la plej oportuna momento por subskribi ĝin estus la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar. La konsenton de ambaŭ flankoj oni ne devis longe atendi. Baldaŭ estis preparita la oficiala dokumento, kaj la hungara delegacio venis al Bjelovar por solene subskribi la Interkonsenton.



Kiel aparte grava programero, en Bjelovar prezentigis ankaŭ kontribuo en la kultura kunlaboro, per aperigo de la kroata eldono de "Sklavoj de dio" (kroate titolita "Božji robovi"), la historia romano de Géza Gárdonyi, unu el la plej grandaj romanverkistoj en la hungara literaturo.

La 400-paĝan romanon tradukis pere de ĝia Esperanta versio (eldonita de HEA en 1972), la veterana esperantisto el Osijek, Aleksandar Kocian, dediĉinte la tradukon al sia edzino.

Pro la solena libroprezento, al Bjelovar estis veninta ankaŭ plurkapa delegacio de Esperanto-societo "Liberiga Stelo" el Osijek, kies membro estas la tradukinto.

La romanon eldonis "Grafokom" el Đurđevac, kaj prezentis ĝin kune la reprezentatoj de ambaŭ landoj: Imre Szabó, kiu parolis pri la aŭtoro Géza Gárdonyi, kaj profesoro Zdravko Seleš, prezentinta la tradukon.


La romano priskribas la mezepokajn eventojn en Hungario sub la regado de Béla la Kvar, sed la ĉefa persono estas la hungara sanktulino Margit (Margareta), la reĝa filino, vivinta en la dominikana monaĥinejo sur la danuba insulo de Sankta Margareta.

APERIS LA ESPERANTA TRADUKO DE “LA KAPREOLIDO PIRGO”

ANDELKA MARTIĆ (1924) estas kroata porinfana verkistino. Literature ŝi komencis aktivi dum la Dua mondmilito, partopreninte en la jugoslavia (partizana) rezistmovado. Post la milito ŝi laboris kiel ĵurnalistino kaj redaktorino de porinfana gazeto *Radost* (Gojo) kaj en la eldonentreveno *Naša djeca* (Niaj infanoj) en Zagrebo. La ĉefaj temoj de ŝiaj verkoj estas milito, infanaĝo kaj naturo. *La kapreolido Pirgo* (originala titolo: Pirgo), romano el la jaro 1953, estas ŝia plej konata verko, en kiu ŝi prezentas kontraston inter la kruda militrealeco kaj la emocia rilato inter la rolantoj. Ŝi estas unu el la plej ofte tradukataj kroataj verkistoj, pluroble premiita en-kaj ekster-lande.

Verkoj: *Jezero u planini* (Lago en la montaro, 1956), *Vuk na voćinskoj cesti* (Lupo sur la ŝoseo al Voćin, 1956), *Bjelko* (Blankulo, 1956), *Dječak i šuma* (Knabo kaj arbaro, 1960), *Proljeće, mama i ja* (Printempo, panjo kaj mi, 1971), *Djedića pričalo i čarobni vrutak* (La aveto babilanto kaj la magia fonto, 1977), *Zarobljenik šumske kuće* (Kaptito de arbara domo, 1989) kaj aliaj.

La romano *La kapreolido Pirgo*, interalie, estas premiita per “Rid-ordeno” de polaj infanoj



(1973), dediĉita al homoj aparte meritaj por pli serena kaj pli bela infaneco. La ĉefaj roluloj de la romano, la knabo Željko kaj la kapreolido Pirgo, estas veraj personoj. Kvankam la aŭtorino komencis verki kiel juna partizanino, la ideologia fono de la romano troviĝas en la dua plano. La arta valoro estas unuavice en la fakto, ke en la unua plano troviĝas infanoj. Ŝia romaneto estas la plej profunda kondamno de milito en la kroata porinfana literaturo. En ĝi malestas sangaj scenoj kaj priskriboj de krueleco, kiuj nuntempe svarmas en la

presaj kaj elektronikaj porinfanaj medio. Pro tio la populareco de la romano, malgraŭ la malaktualeco de la ideologia fono, retenis sian universalan karakteron ankaŭ nuntempe.

La romaneton “La kapreolido Pirgo” traduis en Esperanton Josipa Katunar el Rijeka kaj eldonis “Grafokom” el Đurđevac. Oficiale ĝi estis prezentita en la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, sed ĉi-numere, kun speciala permeso de la aŭtorino, ni publikigas la trian ĉapitron titolitan “Militorfo”.

MILITORFO

Post momento ekregis abrupte silento. La aviadiloj ankoraŭ bruaĉis super la arbaro, sed la skuado ĉesis, kaj al mi ŝajnis kvazaŭ ili laciĝis kaj nun rekaptus la spiron. Ankoraŭ mi ne kuragiĝis moviĝi. La feraj birdoj ankoraŭ super- kaj rondflugis, sed tio estis nenio kompare kun la ĵusa krakado. Ankoraŭ mallonge mi kauris buliĝinte sur la tero, kaj poste profunde forspiris kaj viŝis la ŝviton frunton.

Sed kio okazas? En la arbustaro proksima al mi, mi ekaŭdis mallautan branĉusuron, kvazaŭ ia

besto trabatus la vojon al mi. Kion fari se estas lupo? Aŭ eble urso kiun la bomboj forpelis el ĝia kavo. Fakte, Dragan diras, ke en slavoniaj arbaroj ne vivas ursoj, sed la arbaroj ne estas malgrandaj. Grandaj kaj densaj ili estas, kaj ĉio troveblas en ili. Dum mi konjektadis, la susurado fariĝis pli proksima kaj pli laŭta, kaj poste ĉesis. Dume mi senpaŭze rigardis al tiu direkto. Sed, kio estas tio? Ĉu mi sonĝas, eble? Per manoj mi forte frotis la okulojn, kaj denove malfermis ilin. Ne, mi ne sonĝas! Malantaŭ la arboj aperis bela, milda besteto sur graciaj piedetoj, kun flaveta felo surŝutita per helaj punktoformaj makuloj.

Ĝi levis en la aero la nigran muzeleton,



maltrankvile turnadis la kapon, kaj la rigardon de siaj grandaj, malsekaj okuloj, en kiuj ankoraŭ respuguliĝis la ĵus travivita timo, subite haltigis sur mi. Kaj mi tuj fariĝis pli trankvila pro la milda kaj afabla rigardo. En tiu stranga silento, ni streĉe rigardis unu la alian. Jes, ĝi estas malgranda kapreolido, la sama kiam mi vidis desegnitajn en iu bildlibro, kiun foje la paĉjo alportis al mi el la urbo. Okazis tio antaŭ longa tempo! Kvazaŭ en iu alia mondo!

Gapantaj unu al la alia, ni eĉ ne rimarkis, ke la aviadiloj revenis.

Sed nova bombo eksplodinta malantaŭ la dorso de la kapreolido tranĉis la silenton kaj revenigis nin en la realon. La kapreolido ek saltis, kvazaŭ per vipo batita, skuis la kapeton, ekgapis konfuzite, kaj tiam rapidege alhastis al mi, kuŝiĝis sur la teron kaj alpremiĝis al mi. Miaj manoj aŭtomate volviĝis ĉirkaŭ ĝia tremanta korpo.

Kiel tio okazis? Ĉu mi sonĝas? Mi sentas la varmon de la fragila korpo de la besteto. Mi sentas sub la mano la molecon de ĝiaj mallongaj haroj kaj rigardas la tremantajn brilon en ĝiaj malsekaj okuloj. Subite al mi ŝajnis, ke mi ne estas la sama knabo solece forvaginta en la arbaron. Kvazaŭ la eta besto iamaniere ŝanĝus min. Kaj fakte estis tiel. Mi ne plu estis sola. Jen venis iu serĉanta mian protekton. Mi ne plu estas, kiel ĉiam ĝis nun, la plej malgranda kaj la plej malforta, sed nun mi havas iun por kiu mi zorgos kaj kiun mi protektos. Nun ankaŭ al mi estos pli facile, ĉar kiam homo pensas ne nur pri si mem, ankaŭ la timosento estas malpli granda.

Fine la aviadiloj forflugis al Voĉin. Verŝajne denove super Macute kaj Ĉeralije, sed mi ankoraŭ ne kuraĝis moviĝi. En la arbaro ekregis stranga kvieto. Kie estas ĝia ĉi-matena beleco, kiu komplete okupis min? Pendis rompigitaj branĉoj, folioj ŝutiĝis tra kavajoj, kaj juna kverketo kiu kreske ne atingos siajn altajn kaj branĉozajn silentajn kamaradojn, malgaje kuŝis. Ŝajnis al mi, ke la tuta arbaro triste, tre triste suspiris.

Mi volonte eltiriĝis el la arbustaro en kiu mi kaŝis min, sed mi timis tion fari. Se mi moviĝos kaj formetos la manon de sur la kapreolido ankoraŭ alpremita al mi, ĝi forlasos min. Sed, ankaŭ ĉi tiel mi ne povas resti. Mi lokiĝis pli komferte kaj denove trankviliĝis.

Kio okazis en la Intendantejo? Ĉu iu pereis? Nun ili certe zorgas pro mia foresto, kaj la Onjo ploras ... Eble ankaŭ la paĉjo revenis, kaj nun li malfacile sufokas larmojn pensante ke al mi io malbona okazis. Tiaj pensoj denove maltrankviligis min.

Ne, mi ne plu rajtas resti ĉi tie. Mi devas kiel eble plej rapide reveni al la Intendantejo. Kiam mi volis leviĝi, la kapreolido maltrankvile turniĝis kaj provis eltiri la kapon el sub mia brako per kiu mi ĝin tenis ĉirkaŭ la kolo. Mi bedaŭrus nun resti sen ĝi. Tial mi trankviliĝis. Kaj ankaŭ la kapreolido faris la samon. Dume mi amuziĝis explore rigardante ĝin kaj karesante ĝian silkecan dorson. Kie estas

ĝiaj gepatroj? Kial ĝi perdiĝis, tiel eta kaj delikata? Rigardu kiel bela ĝi estas! Ĝia nigra muzeleto estis malseka kaj malvarma, kaj la kapeto pli gracia ol oni povus eĉ imagi. La kruretojn ĝi fleksis, kaj la malgrandajn orelojn ĝi movis senĉese, kvazaŭ aŭdante iajn sonojn. Kaj tiam subite ĝi denove ekmoviĝis en miaj manoj. Kion tio signifas? Ĉu ĝi denove ion aŭdas? Ankaŭ mi aŭskultis kaj atente komencis per la rigardo esplori la ĉielon. Sed la ĉielo estis kvieti, sen spuroj de aviadiloj, kaj krom la malforta vento en la branĉaroj, nenion alian mi aŭdis. La kapreolido plue maltrankvile moviĝis, kaj mi opiniis, ke ĝi aŭdas ion, kion mi ne kapablas aŭdi. Bestoj havas pli delikatan aŭdkapablon ol iu ajn homo. Tiomente ankaŭ mian oreleon atingis susurado, kiu fariĝis ĉiam pli klara. Mi ekaŭdis ankaŭ la murmuradon de homaj voĉoj. Tute trankviliĝinte, mi pli atente aŭskultis. Ne, mi ne eraras! La voĉoj proksimiĝadis. Jam tute bone mi distingis la fortan kaj iomete sonorantan voĉon de Jovo, kaj imagis kiel li hastas tra la arbaro flankenigante siajn piedojn dum la irado. Ankaŭ Joza estis tie. Mi bone sciis tion, ĉar mi aŭdis la vortojn "al diablo", kiujn li laŭte alkriis. Li ne kapablas diri eĉ kvin vortojn sen ripeti tiun blasfemon.

Mi aŭdis ankaŭ la voĉon de la Onjo. Dum la parolado en ĝi vibris la detenita ploremo:

- Kien li foriris, povruleto? Espereble nenio okazis al li?

- Ni trovos lin, Onjo ... Ĉu en tiom granda arbaro oni trafus ĝuste tian etulon? - trankviligis ŝin Jovo, sed ankaŭ lia voĉo estis ŝanĝiĝinta.

Mi jam bone vidis ilin. Ili paŝis malgaje, kvazaŭ dum enterigo, rigardis ĉirkaŭe, kliniĝis ĉe ĉiu faligita arbo kaj rigardetis sub ĝi ... Per manoj ili forigadis la teron kaj forigi la frakasitajn branĉojn. Prilumis ilin la suno kiu libere kaj abunde surverŝis per siaj radioj ĉiun herbeton en la vundita arbaro.

- Ne, ni ne trovos lin - preskaŭ ekploris la Onjo, kaj mi ne plu povis silenti. Forte brakuminte la kapreolidon ĉirkaŭ la korpo, dum ĝi baraktis, mi ekkriis plenvoĉe:

- Onjo, Joza, mi estas ĉi tie!

Mia voĉo atingis ilin kaj ili haltis. Ili turniĝis embarase al ĉiuj flankoj, sed min, kaŝitan en la arbustaro, ili ne rimarkis.

La Onjo time ekkriis:

- Ŝeljko, kial vi ne montriĝas? Ĉu vi estas vundita?

- Ne, mi ne estas vundita! Venu ĉi tien! Mi estas dekstre de vi.

Ili direktiĝis al la aŭdita voĉo kaj fine rimarkis min kaŭranta surtere sub avelujo. Ili haltis mirante. La Onjo alkuris min, kaj en ŝiaj bluaj okuloj speguliĝis grandega ĝojo kaj feliĉo, miksitaj kun ankoraŭ pli granda miro ĉar ŝi retrovis min. Jovo kaj Joza rigardis min kaj la etan kapreolidon en miaj manoj. Iliaj vizaĝoj estis tiel ridinde longiĝintaj, kaj la okuloj larĝe malfermitaj, ke mi devis tutkore ridi.

Fine Jovo rekonsciĝis. Li kliniĝis, prenis la

kapreolidon, levis ĝin, kaj min demandis:

- De kie vi havas ĝin?

- Ĝi alkuris...

- Nur tiel? Ĝi alkuris?

- Komprenoble, ke ĝi alkuris! Mi ne pelis ĝin - mi ekridis, sentante grandan kontenton, ke ĝuste al mi okazis io tiel nekutima.

Tiam Joža ekparolis:

- Belega ĝi estas, je diablo! Eĉ al plej bona ĉasisto tio ankoraŭ ne okazis. Sed, rakontu, kiel ĝi okazis!

Dum la Onjo purigis mian hararon kaj forskuis buletojn da tero kaj lignerojn de sur mia vestaĵo, mi ĉion al ili rakontis: ke mi kaŭris sub la arbusto, ke ĉio ĉirkaŭe renversiĝis, ke subite mi ekvidis la kapreolidon kiu rigardas min per malsekaj okuloj kaj alkuras por serĉi mian protekton. Ĉion ĉi mi rakontis, nur nenion mi diris pri la grandega timo sentita dum faladis la bomboj. Cetere, tio tute ne koncernis ilin!

Aŭskultante, Jovo grata-dis sian nerazitan barbon, kaj Joža turnadis en la manoj branĉeton elprenitan el mia hararo.

Fine li gajvoĉe krietis:

- Je diablo, ĝi okazis kvazaŭ en fabelo! Ido alpremias sin al alia ido serĉante helpo.

- Al vi kaj al mi certe ĝi ne alpremiĝus - diris li turninte sin al Jovo. - Vi povas kredi al mi! Ĝi pensus, ke ni estas ursoj - ekridis Jovo, altirante la timantan besteton.

- Sed kion ni faros kun ĝi? - demandis la Onjo, kiu finfine purigis min de la tero.

- Kion? Ja mi kunportos ĝin kun mi - mi respondis rapide, timante, ke ili povus fari ian alian decidon.

La Onjo rigardis min kaj mi sentis, ke ŝi kaŝas en si la penson kiu malĝojigos min. Jes, mi konas ŝin kaj ŝian malsanan koron!

Kaj mi ne trompiĝis. Ŝi ekparolis per stranga voĉo, enpeniĝinta rigardante la belegan kapeton de la kapreolido:

- Oni devas lasi ĝin. Ankaŭ ĝi havas patrinon. Vi ne sentis nian tutan doloron kaj maltrankvilon dum ni serĉis vin en la arbaro. Tial vi eĉ ne komprenas tion.

- Onjo, mi ne povas permesi tion - mi ekveis sentante ke mi ekploros.

- Mi ne devigas vin, Željko, - trankvile ŝi diris - sed pensu kiel fartus via panjo se ni ne estus trovintaj vin.

En tiu momento mian kapon trafulis la penso pri mia patrino, kaj mi rememoris ŝian palan vizaĝon en la eta, soleca veprejo, kiam ni entombigis la frateton. Mi rememoris ŝiajn sekajn, sed ŝtoniĝintajn okulojn kaj komprenis kial mi ne rajtus reteni la kapreolidon. Amare suspirinte, mi diris:

- La panjo de la kapreolido estas besto. - Tio ne plu estis lukto, sed akcepto de penso, ke mi perdos la kapreolidon.

Kaj kiam la Onjo diris: "Ankaŭ bestoj havas koron!" - mi alkuris Jovon trankvile staranta kaj observanta nin dum nia interparolo, kaj alkuris lin:

- Kial vi ankoraŭ tenas ĝin? Lasu ĝin jam!

Ĝi iru kien ĝi volas, kaj kial ĝi entute venis al mi? - Timante ekploregi, mi subite eksilentis kaj forte kunpremis la dentojn.

Jovo direktis la rigardon al la Onjo, poste denove al mi, ŝultromovis, kaj li jam volis lasi la konfuzitan besteton, sed tiam ekparolis Joža, kiu pecetigis la branĉeton elprenitan el mia hararo:

- Je diablo, kial vi tiom hastas! Vi ne kapablas pripensi. Oni devas esplori kie estas la kapreolino. Eble ĝi vagas ie proksime serĉante la idon. Ni devas esti certaj, ke ĝi trovos ĝin.

Kun sento de faciligo mi forspiris kaj dankeme alrigardis la ekridintan Jožan. Fakte, li ĉiam havis komprenemon por mi. Jen, li donis al mi la eblecon ankoraŭ iomete reteni la kapreolidon, kiu je tiel mirinda maniero aliris min, kaj kiun mi jam ekamis. Mi reprenis ĝin el la manoj de Jovo kaj alpremis ĝin al mia brusto. Ĝi entute ne estis peza. Aŭ tio nur ŝajnis al mi.

Ni forlasis la lokon kie ni estis starintaj. La patro kaj mi iris al unu flanko, Jovo al alia, kaj Joža al la tria. Mi silentis. Kaj kion ja mi diru? Stranga sento estis en mia koro. Ĉu mi perdos la kapreolidon? Ĉu ĝi trovos sian patrinon, aŭ eble mi rajtos kunporti ĝin? Tiumomente mi ne sciis kion mi preferus. De tempo al tempo el la arbara profundo anonciĝis jen Jovo, jen Joža. Respondadis al ili la Onjo, kiu ĉiumomente turnis sian rigardon al mi. Fojfoje eta rideto ekvibris sur ŝiaj lipoj. Kion ŝi pensas? Ŝi kliniĝis kaj permance forigis branĉojn de la detruitaj arboj, kontrolis en ĉiu kavaĵo, turniĝis jen dekstren jen maldekstren. Kelkfoje eĉ al mi ŝi helpis pasi, ĉar pro la kapreolido kiun mi portis, mi ne povis helpi min mem permance. Ofte ŝi haltadis kaj atente aŭskultadis ĉu aŭdeblas ia susuro. Denove anonciĝis unu el la duopo.

- Heee, ĉu vi trovis ion? - kriis plengorĝe Joža.

La Onjo kolere kuntiris la brovojn kaj kvazaŭ tiumomente ŝi estus rememorinta ion, maltrankvile ŝi diris:

- Per nia kriado ni nur forpelos la gekapreolojn.

Ŝia voĉo apenaŭ silen-tiĝis sur la lipoj, kaj ŝi subite haltis kaj paralizite algapis sub la malnovan kverkon, kies ŝelon malbeligis mitralrafalo. Senvorte ŝi svingis al mi per la mano por ke mi aliru. Mi rapidis kiam la ŝarĝo en miaj manoj permesis. Mi haltis apud la Onjo kaj sentis ke ia amareco rampas supren laŭ mia gorgo, kaj la okuloj pleniĝas per larmoj. Konvulsie mi premis la tremantan kapreolidon kaj rigardis sub la kverkon. Tie, kun etendita korpo kaj kapo sternita sur la trunko, kuŝis la kapreolo. Ĝiaj okuloj estis rigidaj, duone malfermitaj, kvazaŭ ĝi ne povus flankenigi sian rigardon de ĉi tiu arbaro, kiu donis al ĝi la vivon kaj estis ĝia hejmo. El la nigra muzelo likis maldika strio de sango kiu perdiĝis en



la neĝblanka submentono.

La Onjo prenis la kapreolidon el miaj manoj kaj alpremis ĝin al si kvazaŭ etan, senpovan infanon. Sia vizaĝo estis morna, kaj tristo videblis en ŝiaj okuloj. Ŝi turnis la kapon flanken por ne rigardi la senkulpan beston, sed subite ŝi fermis la okulojn kaj ektremis. Mia rigardo sekvis la direkton de la ŝia. Kelkajn paŝojn for de la morta kapreolo, senmove kuŝis ankaŭ la kapreolino. Ankaŭ ĝiaj okuloj estis duone malfermitaj, sed malantaŭ ili radiis terura doloro. Jes, mi komprenis jam tiam, ke ĝia lasta penso sekvis la etan kapreolidon, kiu timante forsaltetis kaj malaperis el ĝia vidkampo. Mi estis tre malĝoja. Tiumomente mi volonte lasus la kapreolidon, nur se ĝiaj gepatroj estus vivantaj. Sufokiĝante en la larmoj kiujn mi ne hontis, mi diris al la Onjo:

- Onjo, ne permesu ke la kapreolido vidu nian ploradon. Ĝi estos malgaja kaj trista.

En tiu momento, alvenis ankaŭ la duopo. Ili vidis nin starantaj silente, kaj ili jam antaŭ ol ili tute proksimiĝis, antaŭsentis kio okazis. Senvorte ili staris apud ni kaj senmove gapis al la pereintaj bestoj. Per stranga instinkto Jovo levis la manon kaj deprenis la ĉapon de sur la kapo. La samon faris ankaŭ Joža.

Por momento ekregis profunda silento, post kiu Jovo peze suspirinte surkapigis la ĉapon, kaj Joža karesis la kapreolidon almetinte la vizaĝon al la velureca felo, kaj triste diris:

- Ho, vi povra militorfo ...

Tradukis:
Josipa Katunar

Marin Držić (1508-1567)

ŜERCO PRI STANAC (Novela od Stanca)

Karnavala komedieto

Personoj.

Stanac, vilaĝano el Hercegovino

Vlaho, Miho, Ĝivo Pešica, junuloj el Dubrovnik

Feinoj, Maskitoj - alvestita junularo el Dubrovnik

Sceno 1

(Okazas tarde, en la karnavala nokto sur la ĉefplaco en la malnova Dubrovnik)

Vlaho, Miho, poste Ĝivo Pašica

Vlaho

Forputru viaj ostoj. Kial vi ne prezentas vin?
Mi vin trapikus, se vi ne malkaŝus vin.

Miho

Mi vin ne rekonis, tial ĉio bone pasis.
Ke mi vin kripla ne faris.

Vlaho

Mankas ja sperto al via jun'.

Miho

Ĉu ĉi spadegon vi ne vidas?

Vlaho

Jes, ruston ĝi surhavas.

Miho

Ĵus estis elprovita!

Vlaho

Tial ĝin sango lavas!

Miho

Eltiru, do, la vian. Pot tuja prov' duela.

Vlaho

Mi ĝin eltirus tuj, sed nur por duelo vera.

Miho

Kia skermant' modela. Kaj kial ĉi ponardo?

Vlaho

Kanajlon kiel vi, devigas je saltoj veraj de sur la Dvičina ŝtuparo.

Miho

Tial vi, do, kuregante paŝis.

Vlaho

Cent frapojn vi ricevos per tiu spada glato!

Miho

Kaj kiuj pelataj sin savis?

Vlaho

Per dia sufero, kia rido! Miro!

Miho

Diru! Kio nune okazi devos?

Vlaho

Mi trovis ĉe l' eniro - ho, mi pro rido krevos ...

Miho

Ĉe tiu amikino ...

Vlaho

Junulojn trovis mi, kaj laste ...

Miho

... ĉu, kiu sin beligas per ŝminko?

Vlaho

... kaj fuĝigis ĉiujn haste.

Miho

Ĉu vi volas diri, ĉe kiu persono?

Vlaho

Poste mi diros al vi ĉion.

Miho

El Podmirje, murega zono?

Vlaho

Per dia sufero, vi trafas nenion!

Miho

Ridinda, vi, kaŝas aĉaĵojn post la vualo!

Vlaho

Ĉe tiu kurtizano, el forbrulinta urbkvartalo.

Miho

Malĉastlin olda, kun kiuj ŝi kunestis!
de l' vangoj, kvazaŭ bokalo, kiu sen emajlo postrestis!!

Vlaho

Kaj kie ĝis nun vi vagis? Kial vi spite al patro
el domo eliri kuraĝis?

Miho

Verdire ridindas mia patro!
Li ŝlosis la domon kaj mi post vespermanĝo
ŝajnis dormemon. Sed mi vidis la ŝancon
lerte trafenestre suben veni.
Kaj kiam ĉiuj foriris, mi brustkirason prenis,
kaskon kapen, tranĉilon al kokso metis,
kaj rustan spadegon ĉe l' zon'.
Kaj persnure mi straten descendis,
dum la saĝa patro kredas, ke mi lite nestas.

Vlaho

Komikas ĉi patroj! Ili ne ĉiam konfesas
ke ili ĉiuj ĉasis, kion ni nun ne ĉesas
en nokto fari. Kiele strigoj.

Miho

La mondo estas tia!

Vlaho

Nu, ĉar ni timas hasasojn*, mi laŭ mia ...

Miho

Mi fekas sur hasasojn! Kion povas ili?
Vi gardu vin ĉe l' Placo, alie eblas iri.

Vlaho

Ni iru for! Ĉu ie estas io?

Miho

Ĉu iu via?

Jes, mia ĉeestas.

Vlaho

Do ek! Se vi pretas!

Miho

Nu, unue aŭdu la jenon!
Hieraŭ vespere iu komika Valaĥo* venis
kaj povra, dormejon en urbo vane trovi penis
tial li, fine, apogis sin antaŭ fontano, al muro,
kun kapro li aperis, fromaĝ' kaj buterbulo.
Pri la oldul' komika ĝis nun mi ŝercis moke,
sed lia kap' jam falas brsten dormovoke.
Ek! Venu kaj ni faru mokŝercon pri li kune!

Vlaho

Per Dio, venu! Kiun ni vidas nune?
Mi tuj lin atakos per spado.

Miho

Donu al li dek frapojn per spada glato!

Vlaho

Kiu diablo ĝi estas? Kiu kontraŭu lin en atako.

Miho

Per dia sufero, mankas al vi kuraĝo kaj koro!

Vlaho

Ek! ni donu viv-signon. - *Cumpare, fa motto!**

Ĝivo

(alivestita kiel vilaĝano)
*Sta largo**, ne ataku, alie vi estos kripliga!

Miho

Cumpare.⁰ Kiu vi estas?

Ĝivo

Verdire, vi vane timigas.

Miho

Per Dio, Ĝivan!

Vlaho

Kiu Ĝivan?

Miho

Paŝica. Estas vero!



Vlaho

Mi ĝisatendis ĵus la mian!

Miho

Ni kaŝu ĉi spadojn. For kun feroj!
Venu al ni Ĝivan, kara frato;
vi nepre kun ni venos, olda Radato*.

Ĝivo

Ĉu vi, do? Vivu! Preskaŭ okazis, ke min tie
iu aĉulo mortigus.

Vlaho

Ho, kiam, frato, kaj kie?

Ĝivo

Mi ilin tri alfrapis; kaj bone eĉ, per vivo mia!

Miho

Sed kia ŝajno? Vi aspektas kiel Valaĥo.

Ĝivo

Ek! iru ni al ago;
Pri iu Valaĥ' komika nun mi mokŝercos iom.

Vlaho

Do, ek! ni iru tien!

Miho

Kia komedio estos tio!

Ĝivo

Per ĉapo vi kapon kovru, kaj gardu ĉi bareton;
Tie ĉi sidu ambaŭ por vidi spektakleton.

Sceno 2

(Ĉi tie Ĝivo vestita kiel Vlaho parolas kun
Stanac:)

Ĝivo

Bonŝancon, bravulo! Kial vi solas ĉi tie tiom?

Stanac

Bonfartu, kara fraĉjo, mi mem ne scias tion!
Hieraŭ vespere mi venis al ĉi urbo inda,
sed nenie dormejon mi trovis; kaj elĉerpita

mi ekiris al ĉi akvo, jam tarde, por ripozi.
Anstataŭ homa kuno, jen freŝa akvo frida
ĝi estas amikino kaj ŝton' kuseno lita;
al mi ne eblas dormi, sed voki matenstelon,
ke de l' nova tago anoncu plenan helon,
por ke al mi en nokto obskura, muta
ŝtelist' ne ŝtelu havon ĉe l' akvo freŝguta.
Varon mi alportis: kapridon kaj buteron,
por tiel gajni kelke da moneroj.
Tial mi estas ĉi tie, kaj nun informu iom:
kiu vi estas, frato, mi scii tre volus tion.

Ĝivo

Mi bovkomercisto, el Gacko devenas,
grasaĵo en ujo bolas. Ŝuldoj min ne premas;
tra tero mi vojaĝas, la maron evitas,
mi dormas streĉaorele, mison eĉ songe ne vidas,
kredite mi ne vendas, ne estas garantianto,
negocas prudente kaj ĉiam sen peranto.

Stanac

Inda vin mi sentas laŭ la vizaĝa klaro
laŭ via kap' prudenta kaj laŭ la negocaj faroj.

Ĝivo

Mi ne sondas limon de l' ĉiela klaro,
nek penetras en enigmon de l' profunda maro;
mezvoji mi volontas, kie feliĉaj iras,
tiel mi min ne trompas: sekuro pleja altiras.

Stanac

Kia prudentul' vi estas, tuj vidas oldo mia
al mi ĝis nun konataj ne estis vortoj tiaj.

Ĝivo

Nu, se prudent' kaj saĝo en mi troviĝas iaj,
ili ja ne devenas el nasko-tero mia.
Kiam, unue mi venis al ĉi urbo feliĉa,
olda mi estis, ne juna, kia mi nun vidiĝas.

Stanac

Ĉu ree juniĝis vi, kara?

Ĝivo

Jes, vere, frato mia!
La barbon mi havis kaj estis grizhara.

Stanac

Ĉu eblas miraklo tias?!

Ĝivo

Mi foje feliĉe, ha!, dum Johan-tago venis
al ĉi urb': nenie dormeĵ, ĉar ĉiuj jam homplenis,
ĉe l' font' veninta, restis, sezono estis sama;
mi manĝis kaj ekregis min baldaŭ songo sana;
dum dormo, jen, mi aŭdas: apude nokt-ludantoj
tre gaje dancojn ludas, frato, kaj eĥas kora kanto
kaj kaptis senretene min pli dolĉega sento
ol eblas tio, vere. En sama ĉi momento
vekiĝis mi kaj vidis: feinoj noktohore
ekdancis, ĉiuj ili, ĉe l' font' fiere, kore;
reŝvebas unu el ili, ŝi prenas manon mian.

La pleje bela fein' oritan pomon sian
donas al mi. La tria, diras: "Venu kaj ĉestu
ĉe l' font' kaj rondodancon fronte gvidante ĝin estru!"

"Trinku, diris la kvara, de tiu trinko, frato,
vi iĝos ege saĝa kaj per tio glorato!"

Trinkis ĝissate mi, gajnin' de l' orpomo,
eĉ dancon apud fonto kondukis kaj pri l' nomo
demandis de l' feinoj. Kaj ili, brava homo,
nomiĝis strange!

Stanac

Diru, ĉiun el la nomoj!

Ĝivo

Revlino la unua, dua feino Flora,
Pav-ino tria estas, la kvara Belaroma
nomiĝis; sed Pav-ino, la ĉarma gravpersona
estrin' de ĉiuj estis, kaj ŝi per ŝmir' kolora
sin ŝminkis. Sed pro instru', min al palaĉ' kondukis
kaj per delicoj raraj ĝis aŭroro gastigis
seniĝis mi de oldo simila al serpento,
haregoj, barb' defalis rapide dum momento;
kaj juna freŝa haŭto ekbrilis sur mi bele
kvazaŭ la brila blanko sen koloraĵ' telere.
Juniĝis mi! Sed fremda mi iĝis al mastrin',
kun mi ne volis kuŝi, el lito forpelis min;
dirinte: "For, ne estas vi la iama homo!"

Ho, l' ostoj batojn sentas!

Stanac

Ĉu uzis vi bastonon?

Ĝivo

Vere, mi ŝin frapegis. Kaj ŝi, la povra, kriĉis,
ĉar timis: baldaŭ tamen, virin' alkutimiĝis.
"Hundin', al vi pli plaĉis, - mi diris - oldo mia

ol nuna jun'. Kak kie dankemo restis via?"

Stanac

Aĥ, por ĉi mia aĝo, miraklaj aferoj!
De mi grizul' neniam ja aŭdis ĉi oreloj
tiaĵojn kiel nune. Mi scias ke feinoj
dancojn vigle ludas, neĝblankaj ĉarmulinoj.
Eĉ mi kun ili ludis, pli frue, sed restis
same tiel olda kiel ĉiam estis.
Ke l' homo rejuniĝas, mirigas tiu fakt'!

Ĝivo

Al ĉiu barbo, frato, ne donas tion fat'.
Kiel vi nomiĝas?

Stanac

Stanac, jen mia nom'. Naskiĝis mi, ja, fore
ĉe Piva river'. Kaj la via? Diru al mi favore.

Ĝivo

Mia nomo Sapaedz', nom' familia Longanaz',
dors-domon helike portas, kie mi estas gast'!"

Puran vinon mi amas;
klara akvo min delektas,
en ĝi, la Kara, vangojn lavas
se rozkronon ŝi finplektas.

Stanac

Ho, frato Sepaedz' Longanaz'
honesta vi kompan', vin indulgu vesp-atak'!

Ĝivo

Mi ne estas lakt', grasaĵ', alie iĝus vesp-frandaĵ'.

Stanac

Hom', pli dolĉa estas vi ol abel-nektaro.
Kiun herbon donis al vi bela feinaro?

Ĝivo

Herb' kampa kun nomo kapra, kiu ĉiam floras
per ĝi mi iĝis juna, ĝi ĉiam helpas sorĉa,
ol ĉiuj herboj estas ĝi verdo pleje dolĉa.

Stanac

Se eĉ mi bonŝance pli juna fariĝus!

Ĝivo

Morgaŭ ĉe l' ĉi akvo, vi povus ŝin ekvidi:
penu, ke unua feino ĉe vi restu;



vigilu. Ke ŝi venos, pri tio certa estu.

Stanac

Se eĉ mi bonŝance pli juna fariĝus!

Ĝivo

Per Dio, ne unua tiale vi feliĉus.

Stanac

Ho, kiom ja oferus bona mastrino mia!

Ĝivo

Ĝojego ŝin ekregus!

Stanac

Ho, kiel ŝi fervorus en okazo tia,
ĉar ŝi tre junas bela, kaj min premeĝas old'?

Ĝivo

Ŝi plezuron sentu veran.

Stanac

Profitus ŝi, jen, mia vort'!
pri mi ŝi ne plu plendus
glacion varmigante, sed ŝi kontenton sentus.

Ĝivo

Vi tute ne ektimu, se la feinoj junaj
elnaĝus el la akvo en ĉi nokt' malluma,
por dancon ekkonduki tre vigle kun vi kune,
ĉar vi bonŝanci povus, vere, nune.

Stanac

Mi diris, kun feinoj pli frue mi kunestadis,
sen panik', ĉar mi neniam timon sentis.

Ĝivo

Per Dio, mi kredas, vi bravulo aspektas.

Stanac

De l' ĉiel' mi havas tion.

Ĝivo

Ĉu iom da trinki vi ne posedas?

Stanac

Akvo apud mi fluetas.

Ĝivo

Akvon en kiu ligno naĝas
kun ŝtono, mi ne trinkas. Adiaŭ, mi dankas!

Stanac

Kien vi hastas?

Ĝivo

Hejmen mi iras, kompano.

Stanac

Restu kun mi ankoraŭ, frato, pro mia amo.

Ĝivo

Mi tre volonte resus, sed mia hejme-strino
alkrius: "Kie vi estis?" Kaj estas diketa ŝi ino!
Pli dikas ŝi ol altas, spanon longas nazo ŝia,
buŝego de muso, la dorso azenlinia,
sur kiu frap-frapas mi kiale sur tamburo,
dum grincas ŝi per dentoj siaj.

Stanac

Per tim' bridu inan buŝon!
Hufobatas ĉevalin' petole,
edzin' sen kapo oponas fole.

Ĝivo

Ah, kiaj saĝaj vortoj. Kia mensa bril!
Mi bele vin gastigos, mi ĵuras per la fil!
Adiaŭ, kara Stanac, amiko simpatia!

Stanac

Ni renkontiĝu baldaŭ, hej, Okaedzo mia!

Ĝivo

Ne estas mi Okaedz', sed Sepa Longanaz'
dors-domon helike portas, kie mi estas gast'.

Stanac

Kia erar'! Pardonu, Sepaedzo kara,
pri hasta lang' malsaĝa.

Ĝivo

(foriras)

En ordo, amiko mia!

Sceno III

(Ĝivo, Miho, Vlaho)

Ĝivo

Ĉu vidis tian, mondo?! Kia komika kampul!
Pli fola ne ekzistas de Kabo* ĝis Mljet-insul'.

Miho

Diablo! Mi krevos ride! Kia plezur'!

Vlaho

Verdire, rid-erupť.

Ĝivo

Diru, nur ...

Vlaho

Mi iru for ...

Ĝivo

(*flustre*)

Ĉu mi spite pro li mokŝercis?

Miho

Igu vin for'!

Vi iam diablis kaj nun min egalas. Kia petol'!

Ĝivo

Kaprido min ravas; eĉ ĝia plor-bleko.

Vlaho

Diablo! Ni iru hejmen! Ek!

Ĝivo

Kia ridiga flegmo!

Pli ol per per* valoras jen tiu kaprido,
kune kun sakoj! KREDU, al mia vort', amiko!
Kaj ĉiun vian vorton kredas kampulo stranga.

Miho

Tro laŭtas vortoj niaj!

Ĝivo

Kiuj tiele blankas?

Vlaho

Maskoj edziĝfesten iras.

Ĝivo

Ĵus, kvazaŭ alvokitaj!

Kiam reaperos, okazos scenoj komikaj!
Pro Dio, mi voku ilin, antaŭ ol malaperos,
ni petu ilin subveni, kredeble ili venos.
La kampulo pensos: aperis feinoj veraj.

Miho

Vi mem alvoku ilin - ili ja tuj obeos.

Ĝivo

Ne!

Ni iru kune kaj iun ŝercon
faru, okazigu!

Miho

Do, venu!

Per Dio, ridinde estos, se ili almenaŭ
unu dancon fari, konsentos.

Vlaho

Ek! Hezito ne helpas!

(Nun ĉiuj foriras, kaj Stanac sola parolas)

Tradukis: Josip Velebit

Cum pare fa motto! - (itale) Kunuloj, diru ion primokan.
hasasoj - noktaj kapitanoj (nobelaj) kiuj kontrolis la urbajn
gardistojn.

Kabo - temas pri kabo sur duoninsulo Peljeŝac.

pero - arĝenta mono en tiama Dubrovnik.

Radato - Ĝivo, kiel aktoro, ludis foje la rolon de Radato en
alia komedieto.

Sta largo - (itale) Staru senmove (gardu vin).

Valaho - vilaĝano el Hercegovino.

* * *

Okaze de la 100-a datreveno de naskiĝo de **Josip Velebit** (1911-2000), la konata Esperanto-verkisto kaj tradukisto, ni publikigas la unuan parton de la traduko de "Novelo pri Stanac", farita el la dubrovnika dialekto. La ĉi-supra tradukparto (farita en 1970-aj jaroj) troviĝis en la dosiero de la tradukinto en Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, kiel kopio de originala manskribaĵo. La lasta parto, kiun ni ne publikigas, aperis en "Voĉo" n-ro 5/1979. Josip Velebit konfidis la tekston al loka Esperanto-klubo "Koko", kiu planis publikigi ĝin, sed la publikigo neniam okazis. Jen bona okazo rememori pri la aŭtoro kaj lia traduko.



EN LA AMIKA LITOVIO

 Vlado Jurković


EN NORDA LITOVIO

Litovio estas unu el la nordeŭropaj landoj, la lando de la Balta regiono, en kiu krom ĝi troviĝas ankoraŭ Latvio kaj Estonio. Ĝis la jaro 1991 ĝi estis parto de Soveta Unio, sed la periodon de soveta dominado multaj litovoj nuntempe konsideras multjara okupacio.

Kompare kun Kroatio, Litovio havas pli grandan teritorion, sed malpli da loĝantoj. Laŭ la statistikoj kaj asertoj, la loĝantaro de Litovio estas je pli ol unu miliono malpli granda ol la loĝantaro de Kroatio. Se averaĝan loĝanton de Litovio oni demandas pri la kaŭzoj de tiel malmulta loĝantaro, oni ricevas la respondon, ke ne okazas sufiĉe da geedziĝoj, kaj ke la geedziĝintaj paroj havas averaĝe inter unu kaj du infanojn. La ĵurnalaj enketoj montras, ke dum la tempo de Soveta Unio malmultaj naskiĝoj estis eĉ pli evidentaj, kaj post la sendependiĝo de la lando, pro la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj, ankaŭ la diagramo de naskiĝoj ŝanĝiĝas.

Litovio plejparte estas agrikultura lando, aparte ĝia norda regiono kiun mi vizitis, dum la aliaj partoj, specife la orienta, estas konsiderataj industriaj. En la nordokcidento kuŝas granda ebenaĵo kun malmultaj arbaroj kiuj, male, karakterizas la nordorientan landparton. Preskaŭ du trionoj de la lando kuŝas en ebenaĵo, kiu prezentas la karakterizan vivon de litovoj.

Pasante tra la norda regiono de Litovio printempe aŭ somete, vidante multajn laĝetojn kaj lagojn, malgrandajn vilaĝojn kaj urbetojn, ekŝajnos al vi, ke vi troviĝas en Ukrainio, ĉar la ebenaĵo aspektas tute same. Dum vintro, kiam la neĝo kovras la teron kaj la temperaturoj estas inter -15 kaj -25 gradoj, oni



Vlado Jurković

malfacile distingas en kiu el tiuj landoj oni troviĝas.

La domoj de agrikulturistoj (kampanaroj) aspektas bele, speciale dum vintro, kovritaj de neĝo. Plej ofte ili estas konstruitaj el ligno, kaj nur en iom pli grandaj vilaĝoj troveblas domoj konstruitaj el la kombinaĵo de brikoj kaj ligno, sed ofte nefasaditaj.

En vilaĝoj kaj urbetoj oni trovas grandan similecon de stratoj kun tiuj de Slavonio. La domoj estas konstruitaj preskaŭ samstile. Onidire temas pri rusa stilo de domkonstruado, en kiu la domoj ne estis konstruitaj alte sed larĝe, depende de grandeco de koncerna familio.

La kampanaroj sur siaj terparceloj kultivas plejparte hordeon, avenon kaj sekalon en la nordo, kaj en la sudokcidento tritikon, maizon kaj lupolon, el kiuj hordeo kaj lupolo estas nepre bezonataj por produktado de biero. Krom tio oni produktas flor- kaj radikleĝomojn. Legomgardenoj ofertas terpomojn, tomatojn, cepon (du specojn),

karotojn, legumon kaj multe da kuracherboj, kio klare videblas en la bazara oferto.

LABOREMA KAJ SILENTEMA POPOLO

Dum mia restado en Litovio, mi estis sufiĉe scivolema kaj demandema. En la Esperanto-klubo "Rute" mi eksciis de iu litova samideano, kiam oni diskutas pri laboro, ke litovoj estas "ne nur laborema sed ankaŭ silentema popolo". Pripensinte liajn vortojn, mi konstatis, ke li pravas. En urbostratoj, busoj, stacidomoj kaj aliaj publikaj lokoj, kie oni atendus viglan diskutadon de homgrupoj, malofte estas aŭdebla eĉ unu voĉo. Ĉiuj plej ofte silentas, kaj aŭdeblas nur murmurado de motoroj. Neniu donis al mi prudentan respondon pri la kialo de tia silento. Laŭ mia opinio temas pri la heredaĵo el la soveta tempo, kiam policistoj spionis preskaŭ en ĉiuj lokoj.

PRI LA SOCIA VIVO

La diferenco inter la sociaj normoj kaj vivmaniero en Kroatio kaj Litovio, laŭ mia opinio estas tre evidenta. La medicina servo en Litovio estas iomete alie formita ol en Kroatio. Bezonante la hospitalan flegadon, oni ne pagas la restadon en la hospitalo, sed komplete pagas la servon de kuracistoj kaj la prezon de medikamentoj uzataj dum la kuracado. Pagata estas ankaŭ la kostoj de operacioj. Ekzemple, operacio de katarakto en la okula retino kostas 750 lidojn (proksimume 230 eŭrojn). La salajroj estas malpli altaj ol en Kroatio. Dungitoj posedantaj universitan diplomon gajnas monate inter 1.400 kaj 1.800 lidojn (proksimume 400 ĝis 500 eŭrojn). Mezedukitaj laboristoj

ricevas inter 1.000 kaj 1.300 lidojn, depende de la speco de laboro. La prezoj en la vendejoj estas similaj al la kroataj. Unu eŭro valoras 3,44 lidojn kaj havas stabilan kurzon. Onidire, tamen, la ŝtataj oficistoj havas duoble pli grandajn salajrojn. Ne ekzistas diferenco inter la viraj kaj virinaj salajroj, kaj trovi laboron estas relative facile. En privataj firmaoj la laboristojn oni pagas por laborhoroj, sed mi ne eksciis pli precizajn informojn. Labortago daŭras ok horojn, kaj sabate oni ne laboras. Escepto estas specialaj servoj, kiuj devas funkcii senĉese.

TRADICIO DE FAMILIA VIVO

En Litovio kaj en la najbara Latvio, la tradicia familia vivo estas tre aprezata. Ekde la 13-a jarcento, ekde la pagana tempo, kiam estis skribita "Arbo de genealogio", kiun mi trovis en iu libro en la Biblioteko de urbo Ŝiauliai, oni estimas la genealogiaon de siaj familioj, praavoj kaj parencoj. Tiun kutimon aprezas pli ol 30 procentoj da litovoj.

Konservado de la familia kaj parenca kunligiteco okazas per tre oftaj vizitoj kaj kontaktoj fizikaj, sed lastatempe

ankaŭ interretaj. En tia maniero oni edukas siajn gefilojn, por ke ili ne rompu la familiajn tradiciojn kaj la genealogian sinsekvon dum sia tuta vivo.

Pri tiu temo estis skribitaj multaj libroj, kaj unu gravega verko estis prezentita antaŭ nelonge en la urbo Gruzdžiai. Kiam mi venis al Gruzdžiai, la loĝantoj de tiu malgranda nordlitova vilaĝo/urbeto lanĉis du grandajn monografiajn volumojn pri la antikva zemgalia distrikto.

La libroprezenta festo okazis dum la tago de nacia sendependeco. Tiu tago estas ekzskluziva por la tuta Litovio, sed neniu alia urbedo, krom Gruzdžiai, havas tiom detalan libron pri sia historia heredaĵo. La monografio konsistas el pli ol 2000 paĝoj! La libron eldonitan de la eldonejo "Versme" per siaj kntribuoj helpis mem la loĝantoj de Gruzdžiai, ĉar la municipa estraro rifuzis helpi la projekton. Temas pri bela civitana ofero por sencohava afero. La redaktoro de "Gruzdžiai"-monografio estas Domijonas Ŝniukas, kaj la esperantistino Nijolė Petraitytė estas aŭtorino de artikoloj.

Multaj el la civitanoj de Gruzdžiai kaj Litovio ĝenerale, nun konservas skribitajn dokumentojn konforme al la

reganta tradicio.

LA EKONOMIA VIVO

Litovio, liberiginte el komunismo kaj refondinte sian ŝtaton, trafis en ekstreme komplikan situacion. La vivon, centralisme organizitan de unu partio kiu gvidis ĝin per metodoj de komando, necesis reorganizi kaj adapti al kondiĉoj de libera merkato. La enlanda ekonomio estis plene integrita en la sistemon de Sovetio. La reformoj komenciĝis en la kondiĉoj de ekonomia malprogreso, kun altiĝantaj prezoj de rusaj nafto kaj gaso. Precipe malfacilaj estis kelkaj komencaj jaroj, kvankam la lando ankoraŭ havas problemetojn kun gaso kaj nafto. Likvidado de kolhozoj kaj privatigo de entreprenoj okazis malorde. Ĉar ne plu ekzistas la "fera kurteno", multaj homoj elmigris eksterlanden serĉante pli bonan laboron. Enkonduko de nacia valuto lido (litas) en 1993 ebligis bremsadon de inflacio. Kreskado de malneta nacia produktado iĝis pozitiva. Kiam en Eŭropo estis komenciĝinta la lasta ekonomia krizo, ĝi tuŝis ankaŭ Litovion, sed la enlanda valuto kaj la inflacio restis stabilaj.

LA KULTURA VIVO

En la biblioteko de Ŝiauliai, kie laboras mia amikino Nijolė Petraitytė, ofte okazas diversaj kulturaj kunvenoj kaj ekspozicioj, ĉiumonate minimume dufoje.

Dum la ĉi-jara februaro okazis kunveno kun latvia etna grupo kiu vivas en la norda parto de la regiono. La temo estis "Organizado de asocio por latva popolo". La gvidadon transprenis la biblioteksitino Nijolė Petraitytė. Estis interese partopreni kaj aŭskulti la diskutojn kaj diversajn proponojn. Unu semajnon poste venis al Litovio la prezidento de Latvio Valdis Zalters, kiel litova oficiala gasto. La grupo de etnaj latvoj organizis renkontiĝon kun



Grupo de latvoj atendantaj la prezidenton de Latvio en Klaipėda.

La 26-an de marto Esperanto-societo "Mondo paca" el Velika Gorica okazigis sian jarkunvenon.

Meze de marto Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac eldonis 5000 ekzemplerojn de informprospekto pri Esperanto, kiun ĝi distribuis dum la 14-a printempa foiro en Gudovac (la 23-an de marto) kaj inter civitanoj kaj lernantoj de Bjelovar.

En Bjelovar Josip Pleadin gvidis Esperanto-kurson por 10 senioraj kursanoj. La kurso komenciĝis la 22-an de marto kaj finiĝis la 26-an de aprilo.

La 27-an de aprilo, delegacio de la Organiza komitato de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj el Bjelovar (Ljerka Stilić, Franjo Forjan, Nenad Margetić kaj Josip Pleadin), estis akceptita en la kroata Ministerio pri turismo ĉe la Ŝtata sekretario Željko Lenart.

En la programo organizita la 28-an de januaro 2011 dum Nokto de muzeoj en Urba muzeo de Bjelovar, okazis ankaŭ la ekspozicio pri H. C. Andersen. En la ekspozicio organizita de la kustosino Silvija Sitta partoprenis ankaŭ Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac per prunto de Esperantlingvaj versioj de Andersenaj verkoj.

En la Popola biblioteko "Petar Preradović" en Bjelovar la 7-an de aprilo estas malfermita la ekspozicio "Esperanto - literatura lingvo", kiu en kvar grandaj murvitriroj prezentas (ĉefe) antologiojn en Esperanto. La ekspozicion iniciatis Zdenka Polašek kaj pruntis la eksponaĵojn Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac.

La 23-an de marto en la 14-a printempa foiro en Gudovac apud Bjelovar, prezentiĝis kvindekda praktikantaj firmaoj de mezlernejoj el la tuta Kroatio. La firmao "Domino" d.o.o./s.l.r. el la Ekonomika kaj buroteknika lernejo de Bjelovar prezentiĝis, iniciate de Marija Horvatić-Kapelac, ankaŭ per Esperantaj reklamoj. En la foiro la delegacio de la Organiza komitato de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj interparolis kun la kroata ministro pri turismo Damir Bajs.

La filatela firmao "Philatel" el Bjelovar, posedata de Željko Saks, en sia retpaĝo <http://www.philatel.hr/> publikigis la tekston "Povrtak esperanta u Bjelovar" (revenodo Esperanto al Bjelovar) kaj eldonis specialajn filatelaĵojn okaze de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj.

Kroata poŝto permesis uzadon de speciala prikongresa poŝta stampo la 14-an de majo en la poŝtoŝeĵo 43000 Bjelovar.

la prezidanto en la urbo Klaipėda, kie li planis transpreni honoran doktorecon de la tiea universitato.

Dank' al Nijolė Petraitytė, kiu sukcese organizis la inviton, ankaŭ ni ambaŭ kun la grupo de latvoj, gastis en Klaipėda, en la akcepto ĉe la latva prezidento. Estis interese aŭskulti la komunikadon kun la prezidento. En unuhora akcepto li respondis la demandojn de la ĉeestintoj, rilate la socian vivon kaj ĝeneralan vivado el Latvio.

Ĉi-jare la urba biblioteko en Šiauliai festas la 90-jariĝon de sia fondiĝo. Kiel gasto mi partoprenis la porokazan feston per mallonga Esperanta parolado, kaj mi donacis al la biblioteko la kopion de la "Tabulo de Baŝka". La feston partoprenis multaj gastoj el la urbaj kulturaj rondoj: verkistoj, universitataj profesoroj kaj ĉiutagaj uzantoj de la biblioteko.



Prezidento de Latvio Valdis Zalters (la unua de maldekstre) en Klaipėda.



**GLACIAJ FIGUROJ
EN KRASNOJARSKO**

 *Elena Ŝaravina*

